

5/2020

Septembro
Oktobro

ISSN 0032-2431

Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Sonja
- ★ La plej malnova minejo en la mondo
- ★ Ĉu indas prepari aranĝon dum la epidemio?

Pola Esperantisto

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

Eldonanto

Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
<http://www.esperanto.pl>

Ĉefredaktoro

Robert Kamiński, rk-lodzo@wp.pl

Kunlaboro

Teresa Nemere, Magdalena Tatara,
Adam Wilkus,

ABONOJ

La abono por 2020 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 53 zlotoj
eksterlando - 20 eŭroj
Cifereca (pdf)
Pollando - 25 zlotoj
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu
adreso estu sendata la revuo.

ATENTO

Abonoj per eŭroj validas post
aldono de bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per

Konto de PEA en UEA: peaa-v;

Detaloj troviĝas ĉe:

<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>

kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Estraro de PEA

Robert Kamiński - prezidanto
Agnieszka Mozer - vicprezidanto
Zofia Śmistek- sekretario
Alina Mozer - kasisto
Marek Mazurkiewicz - estrarano

Ĉefdelegito de UEA

Stanisław Mandrak:
stanislaw.mandrak@gmail.com

Peranto de UEA

Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj
respondecas
la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn
oni ne resendas.

La redakcio rezervas al si
la rajton mallongigi
kaj korekti la tekstojn.

Represo kaj tradukoj nur
kun indiko pri la fonto

Bankokonto por donacoj
64 2130 0004 2001 0558 6110 0001
liberan monsumon priskribu
per vorto "Darowizna"



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Irena Tomaszewska el Szczecin

Enhavo

Redaktoraj vortoj	2
Estraro informas	
<i>Estraro de PEA, Ĝenerala Kunveno de PEA-membroj</i>	3
Eventoj	
<i>Paulina Jaworska, Ĉu indas prepari aranĝon dum la epidemio?</i>	3
<i>Bożena Kocyk, La 53-a Esperanta Feriado en Łądek-Zdrój</i>	5
<i>Adam Wilkus, Krakovanoj kuraĝis</i>	8
<i>Małgorzata Komarnicka, La 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj</i>	10
<i>Ilona Koutny, Ida Stria, Michael Farris, Sukcesa interlingvistika simpozio</i>	11
Mojose	
<i>www.pej.pl, Interreta kurso de Esperanto</i>	13
<i>JES 2020-2021 okazos samtempe en multaj lokoj!</i>	13
Raportoj, rakontoj	
<i>Roman Dobrzyński, Joĉjo gramatikisto</i>	14
<i>Małgosia Komarnicka, Dinamikaj centjarulinoj</i>	15
<i>Roman Dobrzyński, Sonja</i>	19
Pri kio ni aŭdas	
<i>Organiza teamo de la 32-aj ETdK, Fotokonkurso pri naturo</i>	24
<i>Teresa Pomorska, Du konkursoj en Wrocław</i>	24
<i>UEA Komunikoj, Roman Dobrzyński premiita dum "MondaFest"</i>	25
<i>Robert Kamiński, Fariĝu Esperanto-komercisto</i>	26
Vizitindaj lokoj	
<i>Robert Kamiński, La plej malnova minejo en la mondo nun vizitebla</i>	27
Linguosciencia angulo	
<i>Plena Manlibro de E-a Gramatiko, Rolvortetoj De rilate al partipo</i>	30
Literaturaĵoj	
<i>Teresa Nemere, „Ne malkuraĝu,</i>	32
Saĝulaj pensoj	
<i>Anton Oberndorfer, Okulvitroj povus malaltigi infektan riskon</i>	35
Leterkesto	
<i>Irina Mirina Goncharova, EoPK ankaŭ por vi</i>	36
<i>Magdalena Tatara, „Kalkulado” en Wieliczka, ILEI alvokas</i>	36
Kalendaro	37
Deverse, facile, bonguste	
<i>Teresa Nemere, Du hispanaj receptoj</i>	39
Oni eldonis	
<i>“Doktor Esperanto i język nadziei”, „Mazepa”, “Nova aventuro = Nowa przygoda”</i>	40
Forpasis	
<i>Andrzej Kosiński</i>	41
El fotogalerio de Andrzej Sochacki	
<i>Andrzej Sochacki, La 9-aj Esperantaj Tagoj de Kraków - 7-9.12.1990 j</i>	41
Amuze	
<i>Adam Wilkus, La krucenigmo pri arboj</i>	44

Estimataj legantoj!

Jen la kvina numero de „Pola Esperantisto” por la jaro 2020. Tiu numero estas iom pli dika pro longaj kaj interesaj artikoloj. En tiu ĉi numero mi precipe rekomendas la artikolon „Sonia” de Roman Dobrzyński kiu rakontas vere kortuŝan historion de korea esperantistino. Ĉio okazis en Pollando kaj montras kiel la homa sorto dependas de politiko kaj de la homoj, inter kiuj ni vivas.

En ĉapitro „Eventoj” vi trovos eĥojn el la Pola Esperantujo. Post longa agadpaŭzo en nia movado fine de somero, okazis kvin esperantistaj renkontiĝoj. Ni havas priskribojn de esperantista feriado en Łądek Zdrój, raporto pri Esperantaj Tagoj de Krakovo kaj priskribon de la renkontiĝo „Esperanto sur strando” kiu okazis en Sopot.

Małgorzata Komarnicka kaj Ilona Koutny skribas pri du eventoj: „La 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj” en Wrocław kaj „La 5-a Interlingvistika Sipozio en Poznań”, kiuj okazis en nova, virtuala formo.

Danke al nia abonato Yamato Shinjiro, loĝanta ekde la jaro 2013 en Pollando unan fojon en esperanta medio nia revuo prezntas tradukitan al Esperanto poezjaĵojn de japana poetino Ŝibata Tojo.

Nun, kiam venis dua ondo de kronviroza pandemio, vi povas legi la tekston pri protekto kontraŭ la viruso per okulvitroj.

Fine, vi povas vere pliriĉigi vian vortporovizon plenigante sekvan interesan krucenigmon de Adam Wilkus – ĉi foje pri arboj. Pri kio temos la sekvonta?



Novaĵo sur la dua paĝo de PE-kovrilo, estas **bankonto de PEA por mondonacoj**. Karaj, se iu volus helpi al PEA, pro kio la Ĉefa Estraro estos tre dankema, bonvolu sendi al tiu konto liberan monsumon kaj priskribu ĝin per vorto „DAROWIZNA” aŭ per frazo „darowizna na cele statutowe” (donaco por statutaj celoj). Jen la konto: 64 2130 0004 2001 0558 6110 0001

Mi deziras al vi agrablan legadon kaj ĉion bonan.

Robert Kamiński

Ĉefa Estraro informas

Estraro de PEA

Ĝenerala Kunveno de PEA-membroj

La 26-an de septembro 2020, je la 11:30, en la sidejo de PEA ĉe la str. Andersa 37 en Varsovio, okazis la Ĝenerala Kunveno de PEA-membroj.

Pro la raporta formo de la kunveno kaj la pandemiaj ĉirkonstancoj, al sidejo de PEA venis nur 11 membroj (kvar personoj ekster Varsovio). La Ĉefa Estraro prezentis raportojn pri agado kaj financoj en 2019. Sekve, prezentis sian raporton Kontrola Komisiono. Post diskuto pri la raportoj, PEA-estranaro ricevis absolvon por la jaro 2019.

Financaj dokumentoj, akceptitaj dum la kunveno, estis senditaj al impostoficejo.

Eventoj

Paulina Jaworska

Ĉu indas prepari aranĝon dum la epidemio?

Triurba Esperantista Asocio organizis, en septembro 2020, la eventon "Esperanto sur la strando" kun la ĉefa temo: "Paganoj ĉe la balta maro".

La unua dubo estis - ĉu eblas? Kiam la registaro iom post iom reduktis limigojn pro la kronviruso kaj jam estis klare, ke eblas kunveni en pli grandaj grupoj, aperis la dua dubo - ĉu iu venos?

La ĉefa temo de la aranĝo, laŭ nia opinio, estis vere interesa, kaj ni ne volis, ke nia pena preparlaboro simple vaporiĝu.

Ni decidis daŭrigi: "se neniu venos, ni festos mem kaj ni faros filmon pri nia evento".

Meze de aŭgusto, aperis timemaj demandoj el Pollando kaj el eksterlando: "ĉu mi povas aliĝi?", "Ĉu mi ne estos la sola en gastejo?"

Fine, estis specifaj aliĝoj. Post kelkaj demandoj pri partopreneblecoj, kvar kuraĝuloj el Pollando kaj unu eksterlandano decidis partopreni en nia evento.

Dume montriĝis, ke ne okazos la tradicia parado de neregistritaj organizaĵoj en Sopot, do ni, anstataŭ paradi, promenis laŭ la rivero Swelina: de ĝia fonto ĝis plaĝo. Krome, la kuraĝaj gastoj estis rekompence invititaj al koncerto en la Arbara Operejo.

La prelego, preparita de Karolina Czonstke - la kuratoro ĉe la Arkeologia Muzeo – Filio en Sopot, titolita "Kontaktoj en la regiono de la Balta Maro en la frua mezepoko" alproksimigis al ni la ĉefan temon. Gravega punkto de la programo estis la surscenigo de la poemo "Perun" de Julian Tuwim.



La poemo estis tradukita al Esperanto dum vintraj klubaj kunvenoj kaj adaptita por surscenigo de Andrzej Bach – la ĉefa reĝisoro. La roloj estis disdonitaj inter Torentanoj. Ĉiuj partoprenantoj devis decidi, ĉu ili volas esti en la grupo de paganoj, ĉu misiistoj. Ĉiuj volis esti paganoj!

Estis amuze. Premiero de la filmo okazos oktobre, en nia klubejo.

Ni tiel preparis nian programon, ke la plej multaj renkontiĝoj okazis ekstere. La vetero estis favora por ni. Estas vero, ke la ĉi-jara programo estis malpli koncentrita, sed ĝi permesis al niaj gastoj viziti Triurbon "laŭ sia maniero".

Kiaj estas miaj konkludoj post la aranĝo? Kiel ĉiujare, mi malkovris mirindan energion inter niaj klubanoj. Ĉiuj akceptis iun parton de la taskoj kaj kune ni kreis la valoran eventon.

Ni lernis ion novan pri nia najbaraĵo kaj renkontis novajn homojn.
Se ni restus hejme, ĉio ĉi ne okazus.

Se vi interesiĝas pri la prelego, esperantigita de Henryk Kosicki, aŭ pri la Esperanta versio de la poemo „Perun”, ni povas sendi ilin (torentosopot@wp.pl). Ankaŭ eblas legi ilin ĉe nia FB:

<https://www.facebook.com/ESPERANTO.TROJMIASTO> kaj sur nia retpaĝo www.esperanto-sopot.pl. Tie ankaŭ troviĝas fotografiaĵoj kaj komentoj pri la aranĝo.



Bożena Kocyk

La 53-a Esperanta Feriado en Łądek-Zdrój (2-10.09.2020)

Kia surprizo! En la tempo de pandemio realiĝis Esperanta Feriado en Łądek-Zdrój, organizita de Silezia Esperanta Asocio. Łądek estas unu el la plej malnovaj kuraĵlokoj, konata pro radonaj kaj sulfuraj akvoj, por kuraci reŭmatismojn kaj ortopediajn aŭ neŭrologiajn malsanojn. Dum la tuta semajno, la partoprenantoj ne multe parolis pri kronviruso. Feliĉe, neniu el ili havis personajn spertojn pro la virusa kontaĝo.

Aliĝis pli malmulte da homoj ol en pasintaj jaroj kaj ĉiuj eksterlandanoj nuligis siajn aliĝojn. Nenio stranga. En la pensionoj kaj en aliaj lokoj, epidemiaj reguloj estis daŭre validaj. Tiu situacio kaŭzis diversajn ŝanĝojn. Ni havis: mallongajn lecionojn, longajn ekskursojn, malmulte da prelegoj, pli da tempo por aŭskultado de muziko kaj kantado.

Roman Dobrzyński montris kelkajn siajn filmojn. Precipe interesa estis tiu pri UK en Varsovio, en la jaro 1987, kiun partoprenis preskaŭ 6000 partoprenantoj, plej multe ĝis nun.

En tiu tempo li estis la prezidanto de PEA, Humphrey Tonkin la prezidanto de UEA.



Ĝenerale, nia programo estis parte improvizita, ne tute sekvis la detalan planon.

Ĉe la komenco prezentiĝis la 4-persona ensemblo, ludanta malnovan muzikon; aŭdeblis trankvilaj, barokaj kaj renesancaj muzikverkoj.

Dum tiu semajnfino, en Svitavy, ĉeĥaj esperantistoj havis sian 3-tagan feston, do ni buse forveturis al ili. Ni vidis kelkajn filmojn, aŭskultis stratajn koncertojn, kantis komune, akompane de gitaro, kaj babilis kun gekonatoj. Kiel la plej grava elemento de la tiea programo, estis planita koncerto de kanzonoj el la nova, esperantlingva opero „La suferoj de la princo Sternenhoch”, bazita sur la groteska romano de Vladislav Klima. Sur ĝia bazo, la komponisto Ivan Acher verkis operon, kies libretto tradukis la ĉeĥa esperantisto Miroslav Malovec. Du kantistinoj, senzorge, ĉiutage vestitaj (kontraste al la eleganta, stila, historia salono), kantis kelkajn kanzonojn. Ĉeestis la komponisto kaj la tradukisto. La evento estis fiasko por ni, ĉar la plej multe da tempo estis dediĉita por la diskuto, ĉefe en la ĉeĥa lingvo, inter la malmulta publiko kaj la komponisto, fojfoje kun komento de tradukisto. Temis pri la ne tre interesaj aferoj, nekomprenablaj por neprofesiuloj. Unu voĉon el la diskuto mi memoros. La virino, ŝajne gravulino, eble ne esperantistino, konstatis en la ĉeĥa, ke Esperanto ne estas taŭga kaj ne estis kreita por opero, nur por komunikado inter homoj.

Kiel reagis la ĉeĥaj esperantistoj, post la spektaklo en Praga Nacia Teatro?

„Iuj estis ŝokitaj kaj timis, ke oni volis ridindigi Esperanton, ĉar temas pri hororo, kie la ĉefaj roluloj estas monstroj, murdintaj sian infanon kaj turmentas sin mem reciproke”-skribis la tradukisto Miroslav Malovec. Ĉu la opero sukcesos aŭ ne? Jen la demando.

La revena vojo pasis rapide kaj gaje. Du horojn la grupo kantis, akompane de gitaristo. Se oni ne konis vortojn, ĉiuj konis la silabojn la, la la.

Ĝuste dum nia restado en Łądek, UEA anoncis la verdikton pri la ĉi-jara Belarta Konkurso.

Roman Dobrzyński gajnis la honoran mencion en la kategorio eseoj, pro la verko, rilatanta al la fama opero de Stanisław Moniuszko, tradukita al Esperanto de Antoni Grabowski: „Halka kantas Esperante”. Ni solene celebris la eventon, gratulis lin, drinkis ĉampanon kaj spektis filmon pri la verko.

Alia kortuŝa travivaĵo estis, kiam unu el la feriadanoj, handikapulino invitis nin festi ŝian naskiĝdatrevenon. Al ŝi tiu tago estis la plej solena, la plej feliĉa kaj neforgesebla en ŝia vivo. Krom standardaj donacoj, ŝi ricevis riman poemon, skribitan speciale je tiu okazo, kiu en humura formo listigis

nomojn de la ĉeestantaj personoj. La aŭtorino el Szczecin tuj scipovis krei rimojn rilate al la okazintaĵo. Ni havas en Esperantujo nekredeblajn talentojn.

Ekskursojn tra la urbo kaj al la panorama platformo gvidis kompetenta gvidanto, la eksa vicurbestro de Łądek - Grzegorz Szczygieł.

Kiel ĉiam, okazis la sankta meso en Esperanto kaj la koncerto de Wojtek Ławnikowicz.

Resume: bona loko, bona etoso, bongusta manĝaĵo, favora vetero – la ĉijara Esperanta Feriado en Łądek-Zdrój estis interesa okazo renkontiĝi, post kelkaj monatoj de la laciga „kvaranteno”.

Adam Wilkus

Krakovanoj kuraĝis

En la tagoj 11-13 de septembro 2020, okazis la 32-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo, en la renovigita Kulturcentro de Podgórze. La evento estis kelkfoje replanita, pro la tutmonda pandemio, sed kiam la situacio pliboniĝis ĉi-somere, la estraro de la Kulturcentro ebligis kaj helpis organizi ĝin. Bonŝance, la sunplena vetero akompanis nin. Sume la eventon partoprenis 35 samideanoj, kiuj, laŭ postuloj de la organizantoj, sekvis la rekomendojn de la Ĝenerala Sanitara Inspektisto kaj ĉiuj revenis hejmen sanaj.



Okazis diversaj prelegoj, plej parte ilustritaj per lumbildoj - nome pri lingvoj: "Lernooblecoj de la franca lingvo per interreto" - Magdalena Tataara, "La kaŝa komerca ĵargono de mia urbeto" - Grzegorz Słowiński, "Prezentado de noveldonita vortaro EO-PL-EN" - Edward Kozyra, pri arto kaj literaturo: "Halka kantas Esperante" - Roman Dobrzyński, "Doktoro Esperanto" - Anna Ramza, "La popolaj inspiroj en verko de Stanisław Wyspiański" - Lidia Ligęza, "Rakonto de rabino Nachman" - Adam Wilkus, "Sekreto de la bona biblioteko" - Jerzy Antoni Walaszek, pri vojaĝoj: "En la urbo Ljubljana post jaroj" - Dariusz Caban, "Vojaĝo al Jerusalemo, la dezerto Negevo kaj la Morta maro," "Impresoj el Munkeno" - Robert Kamiński, "La Krono de Polaj Montoj" - Adam Wilkus, "La Karaiba Aventuro" - Bożena kaj Marian Kocyk kaj aliaj programeroj, ĉiuj en la lingvo internacia: "Baza demandaro pri Vikipedio" - Ewa Caban, "Sankta meso - Roman Gmyrek, "Kulturheradaĵoj de UNESCO en Krakovo kaj en la regiono Małopolska" - Magdalena Tataara, "Drole kaj petole pri vivo, kiu ne traktas nin mole" - Adam Wilkus. Vespere ni ĝuis belajn koncertojn de E-kantoj de Wojtek Ławnikowicz kaj Suzana Kornicka kun akompano de gitaro.

Okaze de la evento, oni povis rigardi la fotoekspozicion "Naturo per okuloj de esperantistoj", en kiu oni prezentis verkojn de: Ewa Caban, Maria Ŝkutova, Maria Wrożyna, Agnieszka Baczkura, Józef Duma, Paweł Dzienis, Peter Rybín, Vladimír Škuta, Andrzej Sochacki kaj Adam Wilkus.

Sabate oni promenis al la najbaraj parkoj kaj historiaj lokoj de la iama urbo Podgórze kaj supreniris la proksiman monteton Krzemionki Podgórskie kovrita de verdaĵo, apud iama ŝtonminejo, el kies pinto estas bona videbleco.

Multaj samideanoj partoprenis en la dimanĉa ekskurso al la plej malgranda en Pollando, tamen vizitinda pro multaj allogaĵoj, nacia parko *Ojcowski Park Narodowy*, fama pro eksterordinaraj rokoj en verdaj valoj, kavernoj, kie vivis jam la neandertalaj homoj, riveretoj, fiŝ-kultivadejo de la bruna truto kaj renovigitaj kasteloj.

Oni povas rigardi fotojn pri la evento ĉe: <https://tiny.pl/7pmgs>. Por konvene rigardi ilin en la "plena



ekrano", aŭtomate ŝanĝigantaj unu al alia, klaku la etan "triangulon en rektangulo", kiu situas je la supra dekstra angulo de la fenestro. Ĝis la revido en Krakovo venontfoje!

Małgorzata Komarnicka



**Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj**
Europejski Festival Piosenki Esperancj

La 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

Ĉi-jare la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, pro la kronviroza pandemio, okazis en interreto kaj estis subtenata de la urbo Wrocław. La festivalo okazis kun speciala dediĉo al Mila van der Horst-Kolińska, kiu ekde komenco de la festivalo subtenis ĝian disvolviĝon. La reta formo de la kantofestivalo estis multe pli malfacila ol tiuj, en pasintaj jaroj. La organizantoj devis venki amason da malfacilaĵoj, kiel ekz. malgrandigon de la laborgrupo pro malsano, lernadon pri novaj, ĝis nun nekonataj iloj, akceptadon de manko de komunaj renkontiĝoj pro pandemio, ĉar kunlaborantoj loĝis en aliaj urboj kaj eĉ landoj kaj cetere oni devis venki multajn neatendite naskiĝantajn problemojn. Malgraŭ tio, la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj estis sukcesoplena. La festivalo, ĉi-jare vere estis ne nur eŭropa, sed monda. Partoprenis en ĝi multaj esperantistoj el diversaj anguloj de la mondo, el Japanio, Brazilo, Ĉilio, Kolombio, Uzbekio, Pollando, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Svislando, Izraelo.

Sufiĉis nur aliĝi kaj poste sendi filmeton kun kanto. Ĉi-jare estis tri kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto, 3. studia registraĵo kaj sufiĉis kanti nur unu kanton en Esperanto. La aĝkategorioj estis la samaj kiel en pasintaj jaroj: 0-18 jaroj / 19-54 jaroj / 55-111 jaroj. La ĵurio, la aro da internaciaj specialistoj – esperantistoj kaj muzikistoj, pro la escepta situacio, pritaksis ĉefe lingvan kaj muzikan nivelon. En kelkaj kategorioj, la ĵurio decidis ne aljuĝi la unuan aŭ eĉ duan premion - la kvalito de la kantoj lingve aŭ muzike ne atingis la necesan minimumon. Plie estis aljuĝita la Ĉefpremio. Bedaŭrinde, pro teknikaj kialoj, ĉi-jare ni devis rezigni pri aljuĝo de la „premio de la publiko“

WROCLAWO urbo de renkontiĝoj

Honora Patronado de la Prezidanto de Wrocław

La rezultoj estis anoncitaj dum la filma *Koncerto de la Premiitoj*, kiu okazis la 12-an de septembro, je la 16:00 horo, rete. La organizantoj unuafoje preparis la koncerton en tiu formo kaj tio ankaŭ estis malfacila tasko, des pli, ke ĝi estis farita sub premo de la tempo. Ĉi-jare kiel gastoj

prezentiĝis la fama jOmO kaj la pola ensemblo NaRaz el Góra. La pola ensemblo ekestis pasintjare, speciale por nia unua Esperanta turneo, rekomandanta Esperanton en diversaj landoj kun traduko al la lokaj lingvoj.

La honoran patronecon de la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj akceptis Jacek Sutryk - la Prezidanto de Wrocław, Bohdan Aniszczyk - la Prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo kaj la organizaĵoj: Universala Esperanto-Asocio, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, EUROKKA Juna Amiko, Varsovia Vento kaj la pola retransmisio KSON. La Radio KSON fondis belan premion. Ĉiu premiito dum la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj havis eblon havi intervjuon al la radio KSON kaj prezenti sian repertuaron. Belan donacon al la premiitoj fondis ankaŭ la vroclava artistino - Elżbieta Wodała, donacante siajn flortipaĵojn, t.e. ciferecajn desegnaĵojn de bildoj, faritaj el elementoj de sekigitaj plantoj.

Je la nomo de la organizanto - la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, mi ankoraŭfoje elkore gratulas ĉiujn partoprenintojn, precipe la premiitojn. Mi tre dankas al la juĝantoj pro ilia grava kaj ege malfacila laboro.

Mi jam invitas vin partopreni venontjare, en la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.



Ilona Koutny, Ida Stria, Michael Farris

Sukcesa interlingvistika simpozio “Rolo de lingvoj en interkultura komunikado” 17-18.09.2020.

La 5-a Intelingvistika Simpozio – organizata ĉiun 3-an jaron de la Interlingvistikaj Studoj de Adam Mickiewicz Universitato (AMU, en Poznań, Pollando) – sukcese finiĝis. Post la malfermo, fare de la

vicrektorino de AMU, prof. Katarzyna Dziubalska-Kolaczyk, okazis preskaŭ 60 prelegoj en 3 sekcioj ambaŭtage kaj du blokoj da ĉefprelegoj, krome 3 diskutrondoj. Estis grava defio organizi tian aranĝon en la virtuala formo, kunigi kolegojn el Eŭropo, Ameriko kaj Azio en la sama tempo kaj kunmeti prelegojn en 3 lingvoj: Esperanto, angla kaj pola laŭ subtemoj. Dankon al ĉiuj – prelegantoj kaj diskutgvidantoj el 23 landoj – pro la kontribuo.

La ĉefaj sekcioj (en pluraj blokoj) estis *interkultura komunikado*, *lingvopolitiko kaj interkultura instruado*. Ankaŭ la diskutrondoj traktis tiujn ĉi temojn jaŭde vespere. *Esperantologio*, unuavice Esperanta lingvistiko, aperis en pluraj blokoj. Ni mencias ankaŭ la specialan blokon kaj ĉefprelegon pri *gestolingvoj*. La publiko povis demandadi tuj post la prelegoj kaj en la diskutejoj, post la sesioj.

Dank'al la virtuala formo, *pli ol 300 aliĝintoj el la tuta mondo* (pli ol 40 landoj el 5 mondopartoj de Eŭropo ĝis Oceanio) povis sekvi la programon.

Se vi ne sukcesis partopreni iun interesan prelegon, atentu, vi povos rerigardi la prelegojn dum unu monato en la platformo, poste nur kelkajn en speciala YouTube-kanalo.


Post la simpozio ni planas aperi *monografion* el elektitaj kaj prilaboritaj prelegoj. Ni kontaktos la kontribuontojn.

Ni dankas pro la kunlaboro al Katalin Kováts, la gvidantino de la edukista portalo Edukado.net. La bonegan teknikan realigon ni povas danki al la teamo de E@I – Sonja, Dorota, Matthieu sub la gvido de Peter Balaž – kun kiuj ni estis en konstanta rilato dum la lastaj semajnoj. Same ni dankas al la fondaĵo ESF (Esperantic Studies Foundation), kiu helpis la financon flankon de la teknika aranĝo.

Ni ŝatus ekscii vian opinion pri la evento kaj petas vin pleniĝi tiun ĉi demandaron: <https://forms.gle/MzXpXAkraiSXuk3w7>

Dankon!

E@I informis pri alia reta aranĝo, realigita en la sama platformo – KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), kiu okazis en tagoj 1-4 de oktobro. Ĉiujn informojn vi trovos en la retpaĝo: kaest.ikso.net.



Interreta kurso de Esperanto

Ni invitas vin partopreni interete en Esperanta kurso de nulo! La kurso estas desegnita por homoj de 16 ĝis 30 jaroj. La tuta kosto de partopreno estas 100 PLN (pagata antaŭ ol la kurso komenciĝos). Ni kuraĝigas vin registri per la aliĝilo, la nombro da lokoj estas limigita.

La kurso komenciĝos ĵaŭde, la 15-an de oktobro, je la 18.00 kaj finiĝos meze de decembro (17.12). Kursoj daŭros unu horon kaj okazos interrete ĵaŭde, je la 18.00.

La instruisto informos vin pri la detaloj de la komunikaj formoj kaj la datoj de unuopaj klasoj. Aliĝilo: <https://forms.gle/wH5tVpqcZ23foTf8>

La Esperanto-kurson prizorgos Paweł Fischer-Kotowski, diplomiĝinto de la ĉiujara instruista kurso Instruista Trejnado en Poznań.

Se vi havas demandojn, bonvolu kontakti nin ĉe: kurso@pej.pl. La formularo haveblas ĉe nia retejo pej.pl Bonvenon!

JES 2020-2021 okazos samtempe en multaj lokoj!

Post nuligo de la tradicia JES en Wittenberg, ni estas organizantaj mojosan alternativon. Ni proponas al vi la novan formon de la renkontiĝo, kiu konsistas el la virtuala programo kaj lokaj renkontiĝetoj, por realive ekkoni kaj revidi aliajn esperantistojn.

Dum la tagoj la 1- 3 de januaro 2021, vi povos partopreni en la senpaga reta evento, kun ĉiuspecaj programeroj, kiujn vi konas de la antaŭaj JES-oj. Okazos interkona vespero, viaj prelegoj, babilejoj, gufujo kaj drinkejo. La planitaj koncertoj de Jonny M kaj Emerson promesas eĉ pli da bona etoso ol dum la antaŭaj renkontiĝoj. Ne forgesu sendi al ni vian kontribuon al la internacia vespero! La reta programo okazos ĉe <https://hopin.to/>. En la virtuala JES-o povas partopreni multaj homoj, kiuj ne venus al la ĉeesta aranĝo! Ja ne necesas aĉeti biletojn kaj longe vojaĝi, pagi kotizojn por loĝado kaj manĝoj, ne bezonatas vizo kaj forestas pluraj



aliaj obstakloj! Vi bezonas nur komputilon aŭ telefonon, konektita al interreto, aŭskultilojn kaj mikrofonon.

Samtempe ni instigas vin inviti homojn (laŭ la lokaj reguloj) por realvive kune festi. Tial vi kreu surlokajn JES-erojn – malgrandaj renkontiĝoj, por povi eĉ pli ĝui la JES-an etoson. Ni helpos la organizantojn per helpisto de kontaktoj inter diverslokaj organizantoj kaj partoprenemuloj. Do, proponu la renkontiĝon laŭ via imago aŭ aliĝu al jam kreita JES-ero!

Se vi jam antaŭĝojas la eventon, rapide aliĝu, <http://jes.pej.pl/eo/>, sendu al ni proponojn por la programo kaj vian kontribuon al la internacia vespero. Kaj plej grave: organizu vian JES-eron!

Raportoj, rakontoj

Roman Dobrzyński

Joĉjo gramatikisto

Mia pranepo Johano, karese Joĉjo, naskiĝinta decembre 2016, dum tri jaroj laŭte kriis, ploris, sed ne parolis. Li komprenis, kion oni diris al li, sed respondis nur per kapmovo jese, aŭ nee. Kiam li atingis la aĝon de tri jaroj kaj duono, mi vizitis lin post kvarmonata foresto. Li surprizis min per laŭta saluto: *Dziadek Roman! (Avo Roman!)* Mi demandis pole: *Kie estas Via panjo?* Li respondis: *Moja mama poszła do sklepu kupić szarlotkę. (Mia panjo iris al vendejo aĉeti pomkukon.)* Mirigis min lia klara prononco. Lia patrino sciigis min, ke Joĉjo, dum sia longa silentado, transsaltis la periodon de la infana blablado kaj ekparolis per la ĝusta prononco.

La frazo, dirita de li, impresis min ne nur pro la prononco, sed ankaŭ pro ĝia ĝusta konstruo. Kiel klarigi la fakton, ke infano, la centprocenta analfabeto, senerare aplikas gramatikon. Mi rememoris lian avinon, la germaninon Erika, kiu ekloĝis en Pollando, sen koni la polan lingvon. Ĝian gramatikon ŝi trovis tiel malsimpla, ke suferis ĝin kiel koŝmaron. Tiu ĉi komplikeco videbliĝas en la simpla frazo frivole dirita de Joĉjo. Ni analizu ĝin laŭ la pola gramatiko:

Moja mama - mia patrino – pronomo poseda kaj substantivo, ambaŭ de singulara nombro, femala genro, nominativa kazo, en frazo – subjekto. *(zaimiek dzierżawczy i rzeczownik, obydwa wyrazy liczby pojedynczej, rodzaju żeńskiego, w mianowniku, w zdaniu – podmiot).*

poszła – iris – verbo de pasinta tempo, finita aspekto, tria persono de femala genro, nombro singulara, en frazo – predikato. (czasownik czasu przeszłego dokonanego, liczby pojedynczej, trzeciej osoby rodzaju żeńskiego, w zdaniu – orzeczenie.)

do – al – (prepozicio indikanta direkton) przyimek wskazujący kierunek

do sklepu – al vendejo – substantivo, maskla genro nevivanta, nombro singulara, kazo genetiva, en la frazo – atributo (rzeczownik rodzaju męskiego, nieżywoty, liczby pojedynczej, w dopełniaczu, w zdaniu – przydawka.

i – kaj – konjunkcio, ĉi-kaze kunigas propozicion kun subpropozicio (spójnik w tym przypadku łączy zdanie nadrzędne z podrzędnym.)

kupi – aĉetos – verbo de futura tempo, komuna por tri genroj, tria persono de singulara nombro. (czasownik czasu przyszłego, wspólny dla trzech rodzajów, trzeciej osoby liczby pojedynczej).

szarlotkę – pomkukon – substantivo de femala genro, singulara nombro, akuzativa kazo; en la frazo – komplemento (rzeczownik rodzaju żeńskiego, liczby pojedynczej w bierniku; w zdaniu – dopełnienie.

Karaj Legantoj de „Pola Esperantisto”, mi proponas al Vi analizi la Esperantan version de la frazo, dirita de Joĉjo, por kompari kaj kompreni, kiel facila estas la gramatiko de la lingvo internacia. Ek al!

Małgorzata Komarnicka

Dinamikaj centjarulinoj

Kiam mi eksciis, ke la patrinoj de miaj amikinoj ĉi-jare printempe festis preskaŭ cent jarojn kaj pli precize 99 jarojn, mi tuj decidis uzi tiun okazon, interesîgi pri la temo de longviveco kaj skribi leteron al ĉiu solenantino:

“Kara solenantino, mi nomiĝas Małgosia Komarnicka kaj deziras al vi, okaze de via belega naskiĝtago, samajn belegajn tagojn samtempe mi dezirus ekscii, kia estas via recepto por longviveco ... Tiu fenomeno ekinteresis min kaj mi volonte priskribus ĝin. Eble ekzistas iu komuna eco de vivstilo de personoj, kiuj ĝojas pro longa vivo. Mi tre petas, dividi kun mi la historion de via vivo kaj la recepton por longviveco”.

Post nelonga tempo, alvenis respondoj kaj mi provis kompari ilin kun tn. “scienca skemo de longviveco”. La t.n. “sciencan skemon de longviveco” kreis scienculoj, kiuj de multaj jaroj observas centjarulojn en multaj landoj. Tiuj esploroj permesis al ili konstati kelkajn komunajn ecojn.

- Unu el la komunaj ecoj estas dieto. Mi deziris ekscii, ĉu polaj centjarulinoj aplikis iam ajn iun dieton. Hodiaŭ ja dietoj estas ege modaj. Oni rekomendas manĝi viandon kaj ne manĝi ĝin, kalkuli kalorion kaj ne fari tion, manĝi difinitajn porciojn en difinitaj horoj, ktp ... Mi neniam havis tempon por apliki dietojn. Kaj eble estas necese elekti iun? Sed, kiun?

- La patrino de Ela:

En mia junaĝo, dum la dua mondmilito kaj poste, dum la komunista tempo, oni ne aplikis iun ajn dieton. Dum la germana okupacio, ni estis forpelitaj el nia familia domo kaj ni nomadis loĝante en diversaj domoj, vilaĝoj, bienoj... Ni manĝis tion, kio estis atingebla, sed la plej ofte: terpomojn, lakton, ovojn, buteron, legomojn kaj tre malofte viandon. Simile estis dum la postmilitaj tempoj. En 1945 mi komencis loĝi en Vroclavo. Tiam la manĝaĵon plej ofte oni aĉetis rekte de terkulturistoj kaj bredistoj, kiuj siajn varojn alveturigis al la urbo kaj vendis ilin al la loĝantoj. Feliĉe, mi ankaŭ havis t.n. „laborejan ĝardenon” kaj povis kultivi legomojn kaj fruktojn por mia familio. Tiu manĝaĵo estis sana, sen kemiaj aldonaĵoj, ktp. Kiam mi fariĝis emeritino, mi pli multe komencis interesiĝi pri sana nutraĵo kaj ankaŭ pri la nekonvenca medicino.

- La patrino de Irenka:

Infanaĝon mi ne havis. De la plej junaj jaroj mi laboris kiel servistino. La lernejo estis tro malproksime kaj do miaj gepatroj decidis, ke mi ne frekventu ĝin. Post la milito, mi kulturis teron kune kun la familio de la edzo. Estis tre peze. Al Wrocław ni alvenis en 1948 kaj, loĝante jam en la urbo, mi laboris kiel prizorgantino. Mi purigis sep grandajn brikdomojn, mi frotpurigis lignajn ŝtuparojn, mi ordigis kelojn, subtegmentojn. Mi ankaŭ ordigis vendejojn kaj vintre purigis stratojn de la neĝo. Kompreneble, la infanoj helpis al mi. Tio estis peza, fizika laboro, tre peza laboro ... Pri dietoj mi ne pensis. Neniam mi aplikis ilin. Mi manĝis ĉion, kio estis sur la tablo. La plej ofte panon kun butero, terpomojn, viandon, lakton, nudelojn kun fromaĝo kaj mi trinkis nigran, amaran kafon, faritan el glanoj. Foje eĉ estis tagmanĝo... En Wrocław manĝaĵon oni aĉetis sur vendoplaco, rekte de terkulturistoj kaj bredistoj. Tiam mi plej ofte aĉetis laktoproduktaĵojn (freŝan lakton, ovojn, fromaĝojn), viandon (kokidojn, kuniklojn, kojpojn), mielon, legomojn kun granda kvanto da spinaco, sed ankaŭ fruktojn (ĉerizojn, prunojn, pomojn). Pomojn ni aĉetis en kestoj, ĉar mia edzo opiniis, ke pomoj savas nian vivon. Mi multe bakis kaj kuiris, la plej ofte acidfarunan supon (pole: žurek), mi acidigis ankaŭ brasikon, ruĝajn betojn, mi faris proprajn



komputojn kaj konfitaĵojn. Ĉion ni manĝis freŝan kaj sanan. Ĝis nun mi ripetas al miaj infanoj, ke ili aĉetu nur freŝan manĝaĵon.

- Alia eco de longa vivo estas, laŭ sciencistoj, fizika aktiveco. Ni nun havas ja kulton de gracia korpo. Ĉu la centjarulinoj praktikis de infanaĝo sporton? Kiun? Mi ĉiam ŝatis promeni, sed ĉu tio sufiĉas? Kaj eble mi jam komencu praktiki iun ekstreman sporton?

- La patrino de Ela:

Konkretan sporton mi neniam praktikis, sed mi tre ŝatis bicikli, naĝi, promeni, piedekskursi. Ĝis nun mi estas aktiva. Ĉiun tagon mi gimnastikas kaj promenias. Bedaŭrinde, pro miaj jam malfortaj kruroj, miaj promenoj ne estas longaj ...

- **La patrino de Irenka:**

Mi neniam praktikis iun ajn sporton, nur pezan laboron. Tiu laboro estis mia gimnastiko kaj sporto. Mi mane lavis vestaĵojn, ofte helpe de lavilo, mi paŝtis bovinojn nudpiede, ĉar mi ne havis ŝuojn kaj mi ofte dormis en stalo. Miajn unuajn ŝuojn mi ricevis nur por la Unua Komunio...

- Ĉu gravas familiaj kaj sociaj kunligoj? Hodiaŭ ni izolas unu de la alia, ne nur pro kovida pandemio. Ni havas interreton kaj ĝi komencas plenumi multajn gravajn funkciojn en nia vivo. Mi ŝategas familiajn renkontiĝojn, parolbruon de infanoj, genepoj, sed ankaŭ renkontiĝojn kun

geamikoj, konatoj... Kaj eble soleco estas grava en nia vivo?

- La patrino de Ela:

Mi estas tre familia kaj societema persono. Mi ĉiam ŝatis renkontiĝojn kun familio, amikoj, konatoj, precipe kun tiuj, kiuj havas similajn interesiĝojn. Nun, verdire, mi jam havas nur familiajn kontaktojn, ĉar mi vivas pli longe ol miaj amikoj kaj konatoj ... Mi malbone toleras solecon, tre mankas al mi sociaj kontaktoj ... La familio estas ege grava.

- La patrino de Irenka:

Mi naskis 4 infanojn. Mi havas 4 nepojn, 2 nepinojn, 5 pranepojn, 3 pranepinojn ankaŭ prapranepojn kaj prapranepinon. Mi ŝatas familiajn renkontiĝojn, renkontiĝojn kun geamikoj aŭ kun konatoj. Mi ŝatas komunajn festotagojn. En nia hejmo ĉiam estis multe da personoj kaj multe da ĝojo, neniam mankis hejma manĝaĵo, per kiu mi regalis gastojn. Mi ĉiam ŝatis gastojn kaj ĉiam mi havis tempon por ili. Ĝenerale, mi ŝatas homojn, mi ŝatas helpi al ili. Mi ne ŝatas solecon, tiam mi ploras, rememoras terurajn tempojn, stresiĝas ... Mi ankaŭ tre ŝatas florojn, kun ĝojo mi observas, kiel ili kreskas, floras. Mi ĉiam trovas ion por fari...

- Kaj kio kun streso? Hodiaŭ estas malfacile vivi sen streso. Malgranda dozo de ĝi estas utila, ĉar permesas venki malsanon, sed longdaŭra streso elvokas seriozan malsanon...

- *La patrino de Ela:*

Sola restado hejme elvokas ĉe mi grandegan streson. Alvenas tiam al mia kapo diversaj malagrablaj, ĉagrenigaj pensoj, malplezuraj rememoroj. Mi fariĝas nervoza kaj eksplodema ...

- *La patrino de Irenka:*

Mi havas trankvilan temperamenton. La streso ... Ĉiu vivas kun ĝi. Malsano de familianoj, amikoj, konatoj ege min deprimas kaj stresigas. Ĉiam iel mi dezirus helpi, interparoli, konsili. Mi bakas aŭ kuiras ion bongustan, regalas, nutras ... Mi ĉiam helpas al homoj kaj tio donas al mi ĝojon. Nun ege stresigas min nia nuntempa situacio en mia lando kaj en la mondo.

- Ĉu valoras havi hobion? Mi tre engaĝiĝas en multaj aferoj. Mi ŝategas agi, fari ion por aliuloj. Mi estas feliĉa vidante ĝojon de aliaj personoj. Multfoje mi engaĝiĝas tiel forte, ke mi forgesas pri mi mem ...

- *La patrino de Ela:*

Multaj aferoj interesas min kaj mi klopodas, laŭ miaj eblecoj, progresigi ili. Ekz. mi sisteme studas la libron pri la metodo de Silva kaj mi, kompreneble, aplikas ĝin. Ĝis antaŭ nelonge mi pentris bildojn. Mi mem ellernis pentri rigardante televidan programon „Pentrado estas facila”. Mi interesiĝas ankaŭ pri politiko, publikaĵoj, sed tiuj programoj, bedaŭrinde, stresigas min... Tial pli volonte mi rigardas programojn pri naturo aŭ arkitekturo. Cetere, mia „nedisigebla” akompano estas saĝtelefono, danke al ĝi mi partoprenas en diversaj sociaj medioj.

- *La patrino de Irenka:*

Malgraŭ tio, ke mi jam ne havas tiom da forto kaj sano kiel iam, mi absolute ne kapitulacas. Mi ĉiam devas ĉion mem fari, eĉ se mallerte ... Doloras al mi kruroj kaj kuracisto konsilis multe piediradi. Mi do, malgraŭ doloro, kun bastono, promenas kaj ne plendas ... Mi eĉ biciklas, kompreneble per la hejmbiciklo.

- Ĉu mi devas ankoraŭ scii ion por havi ne nur longan, sed ankaŭ feliĉan vivon?

- *La patrino de Ela:*

Laŭ mi, mia longa vivo estis variigita. Estis tragikaj momentoj kaj feliĉaj, bonaj kaj malbonaj. Kvankam, verdire, mi ŝajne estas pesimistino, tamen mi havis kaj havas, dum mia vivo, multe da feliĉo. Mi ne suferas fizike, malgraŭ multaj doloroj, mi estas memstara, sendependa kaj mi havas vere amatan familion kaj bonan zorgon de mia filino.

- *La patrino de Irenka:*

Mi ne ŝatas se iu helpas al mi, ekz. kunporti aĵojn. Mi estas „Zonjo Memulineto”, mi ŝatas ĉion fari mem. Mi bedaŭras, ke mi ne finis lernejon, ĉar tiam mi povus legi pli da libroj kaj revuoj, sed mi ŝatas aŭskulti radion, rigardi televidon. Mi do scias, kio okazas en mia lando kaj en la mondo kaj mi ŝatas interparoli pri tio.

Mi ĝojas pro mia vivo, kvankam ĝi ne ĉiam estis facila. Laŭ mi, la longan vivon ebligas ankaŭ genoj. Mia fratino vivis 100 jarojn kaj 7 monatojn.

Mi dankas pro la bondeziroj kaj mi deziras al vi, Małgosia multe da sano kaj longajn jarojn de la vivo, de la feliĉa vivo.

Sumigante la respondojn de miaj interparolantinoj, mi eble povas konstati, ke por longe kaj feliĉe vivi oni devas antaŭ ĉio ĝui la vivon, pensi pozitive, multe rideti, sed ankaŭ ami sin mem kaj aliulojn, kun ĝojo helpi unu la alian, sane nutriĝi (la plej ofte preparante mem la manĝaĵon), ne timi pezan laboron kaj ne eviti gimnastikon, eĉ dum la maljunaĝo. Valoras ankaŭ realigi siajn revojn kaj ne torturi sin per diversaj elpensitaj dietoj aŭ duontagon pasigi en korpekzercejo.

Roman Dobrzyński

Sonja

Seulo 1994. Ĵus finiĝis la solena malfermo de la 79-a Universala Kongreso de Esperanto. La kongresejon forlasas du mil partoprenantoj. Ĉarmas japanoj en kimonoj kaj koreinoj en siaj kvinkoloraj roboj. Tiel vestita koreino alparolas min kaj prezentiĝas kiel membro de Pola Esperanto-Asocio. Tiun ĉi surprizan fakton konfirmas ŝia kongresa identigilo: *Sunay Kim Jędrzejczak - Pollando*.

Jardekojn pli frue, UNESCO anoncis 1959, kiel la jaron de Ludoviko Zamenhof, okaze de lia 100-a naskiĝdatreveno. Varsovio gastigis la 44-an Universalan Kongreson de Esperanto kun ĉeesto de 3500 esperantistoj. En la tiama Pollando, aparetenata al la Sovetia politika bloko, la lingvo internacia renomiĝis kiel „fenestro al la tuta mondo”, kaj logis polojn amase lerni ĝin. Mi, estante studento, gajnis monon per instruado de Esperanto, dum miaj universitataj kolegoj samcele purigis fenestrojn kaj plankojn. Mi gvidis kelkajn kursojn, interalie en la Junulara Kulturdomo ĉe la strato Łazienkowska en Varsovio. Partoprenis ĝin lernantoj, inter kiuj distingigis Kim Yu, knabino el la norda Koreujo. Ŝi estis unu el miloj da viktimoj de la korea milito, kiu komenciĝis en 1950, sed formale daŭras ĝis nun, malgraŭ armistico, subskribita en 1953. Mia diligenta kursanino subite ĉesis viziti la kulturdomon, ĉar ŝi estis vokita veturi al sia patrujo por ferii, kaj neniam plu revenis.

**

Kial Kim Yu ne revenis? Tion mi eksciis en Seulo de Kim Sunaj, kiu en 1955 ankaŭ venis el la norda Koreujo al Pollando, por studi. Dum la unua jaro ŝi lernis la polan lingvon, sekve fariĝis studentino de kemio en la Universitato

de Łódź kaj rememoris tiun ĉi tempon la plej bela de sia vivo. Ŝia studenta kolegaro ŝanĝis ŝian korean personan nomon Sunaj je Sonja. Foje ŝi vizitis la Esperantan klubejon, rapide lernis la lingvon de Zamenhof, kiu ankaŭ por ŝi evidentiĝis „fenestro al la mondo”, danke al korespondaj kontaktoj, interalie kun esperantistoj en la suda Koreujo. Ŝi amikiĝis kun la geedzoj, loĝantaj en Seulo. Laŭ la kutimo de koreaj esperantistoj, ili uzas pseŭdonimojn, ŝi nomiĝas Salo, li Maro. Tiu ĉi samideana familio ebligis al Sonja partopreni la 79-an UK-on. Post la fermo de la kongreso Sonja proponis al mi unusemajnan komunan rondvojaĝon tra la Korea Respubliko. Tion mi trovis avantaĝo, ĉar ŝi kiel koreino certigis al ni ambaŭ, vizitadon de la lando laŭ prezoj multe malpli altaj ol tiuj, kiujn devas pagi eksterlandaj turistoj. Ni unue iris al Panmunĝon, kie trapasas la 38-a latitudo - la limo inter ambaŭ Koreujoj. Sonja rigardis al sia patrujparebla pikdrata baro. Transe regis silenta vakuo. Ŝi diris: *Malmulte mankis, ke tien mi estus veturigita en la jaro 1961.* Ĝuste en tiu ĉi jaro malaperis



senspure mia kursanino Yu Kim. Ankaŭ Sonja fine de junio 1961 ricevis ordonon devige veni al la ambasadejo de Korea Popol-Demokratia Respubliko en Varsovio kun la celo veturi en la patrujon. Por feriado.

En la fororienta kultur-konscio fiksiĝis la imperativo obei desupraĵn ordonojn. Sed Sonja, post la kvinjara vivo en Pollando, modifis sian pensmanieron. Ŝiaj studoj baldaŭ estis finiĝontaj, kial do veturi Koreujon por ripozi, se eblas tien

baldaŭ reveni kun la universitata diplomo? Ŝi neglektis la senracian proponon de la ambasado. La sekvan tagon ŝi revenis malfruvespere al sia studenta loĝloko kaj en la pordejo eksciis, ke longe atendis ŝin personoj, venintaj per aŭtomobilo kun diplomata ŝildo. Ili lasis por ŝi severan ordonripeton veturi la morgaŭan tagon al Varsovio kaj prezentiĝi en la ambasadejo. Sonja konsciigis al si danĝeran konsekvencon de sia malobeemo kaj ne plu dubis, ke la diplomata aŭtomobilo povas eĉ dumnokte reveni. Ŝi urĝe pakis siajn aĵojn kaj forlasis la studentan domon. Teruris ŝin fantomoj de la milito. Ŝi rememoris jenan scenon: homoj fosas kavon, poste vice ekstaras apud ĝi, kaj enfalas

mortpafitaj. Ŝi kun siaj lernejoj kolegoj devis spekti, kiel estas punataj „perfiduloj de la patrujo”.

Sonja atenteme forlasis la studentan domon kun la intenco kaŝi sin en la norda regiono Pomerio, ĉe sia amikino, kiu invitis ŝin gastigi dum la somera studpaŭzo. Timante la gvatadon, ŝi decidis veturi el Lodzo al Gdansko ĉirkaŭvoje, tra Krakovo kaj Varsovio, por forviŝi spurojn. Ŝia malgranda monprovizo rapide elĉerpiĝis.

Sonja: *Ĝuste tiam mi konstatis, ke malbonaj homoj ne ekzistas. Sur mia zigzaga vojo mi renkontis nur bonulojn, kiuj etendis al mi sian helpan manon. Veninte per trajno el Krakovo en Varsovion, mi ne povis daŭrigi la vojaĝon pro manko de mono. Sur la kajo mi aliris konduktoron de la trajno, veturonta al Gdansko, kaj sincere prezentis mian embarasan situacion. Li senvorte indikis la malfermitan pordon de iu vagono. Kiam la trajno estis jam veturanta, li kontrolis biletojn, sed senvorte preterlasis min. La saman komplezemon de la senpaga veturo mi spertis en busoj kaj eĉ en taksio. Veturante petveture mi devis nenion klarigi, sed ĝuis komplimenton, per kiu la ŝoforo laŭdis mian fluan pollingvan parolon.*

Dum la transira periodo de la kvindekaj al la sesdekaj jaroj, okazis la splitiĝo de politikaj rilatoj inter Ĉina Popola Respubliko kaj Sovet-Unio. En tiu ĉi konflikto la korea gvidanto Kim il Sung apogis la ĉinan - Maŭ Ze Dong. Somere 1960, la sovetunia registaro, gvidata de Nikita Ĥruŝĉov ordonis retiri ĉiujn rusajn ekspertojn el Ĉinio. Same reagis la Ĉina Popola Respubliko, kaj sekvis ĝin la alianca Norda Koreujo. Tiu ĉi deviga politika migrado trafis la koreojn tiam troviĝantajn en Pollando. Sonja ne sciis, kio okazis kun la „polaj” koreoj devige revokitaj „ripozi” en la norda Koreujo. Kiam pasis du monatoj de la studenta feriado, ŝajnis, ke la problemo malaperis. Sonja revenis al Łódź, por fini sian lastan studperiodon kaj akiri diplomon. En la administrego de la Kemia Fakultato oni bonvenigis ŝin ĝoje, sed kun mirego, ĉar en la listo de studentoj ne plu troviĝis la nomo Kim Sunaj. Laŭ informoj de la nordkorea ambasado ŝi reveturis al sia lando. Do, Sonja estis en Pollando fakte, sed formale ŝi tute ne ekzistis. El tiu ĉi paradokso rezultis grandaj problemoj. Ŝi ne plu povis daŭrigi sian studadon, perdis stipendion kaj la rajton loĝi en la studenta domo. Ŝi ne havis sian loĝlokon kaj vivrimedojn. La homo sen adreso estis fantomo. Tamen Sonja estis materia fakto kaj tio prezentis kroman danĝeron. Ŝi, eksterlandano, estadis en Pollando kontraŭleĝe, ĉiumomente minacis ŝin aresto kaj ekstradicio.

Sonja kontraŭleĝe plu loĝis en la studenta domo kaj pripensis kun siaj koleginoj, kion fari. La afero ekhavis politikan karakteron, do estus rekomendinde serĉi helpon ĉe la polaj aŭtoritatoj, eble tuj ĉe la ĉefministro Józef Cyrankiewicz, parenteze dirante - simpatianto de Esperanto. Tamen, tiu vojo montriĝis longa, dum oni devis urĝe agi. Ankaŭ aliaj ideoj aŭguris neniun ŝancon. Sonja konsciis, ke ŝia ambasado informis la polan policon pri ŝi kiel kaŝanta sin kontraŭleĝa rifuĝintino. Ŝi eĉ miris, ke ankoraŭ ne estas arestita, sed ne dubis, ke tio baldaŭ okazos. La malbonŝanca deliktulino riskis libervole anticipi la areston kaj sin mem prezentis ĉe la polica oficejo en Lodzo. Surprize akceptis ŝin la ĉefkomandanto mem. Li turnis sin al ŝi kiel al konatolino kaj diris: *Sonja, se vi scipovis ĝis nun kaŝi vin mem, kaŝu vin plu. Tamen, eble provu viziti la Ministerion de Altlernejoj en Varsovio, kaj prezentu vian problemon al la direktoro, respondeca pri eksterlandaj studentoj. Diru al neniuj, ke vi estis ĉi tie kaj parolis kun mi.* En Varsovio la interparolo estis tre mallonga: *Vi havas nur unu ŝancon. Edziniĝu al pola civitano.*



Sonja kun geamikoj en Vilno, 2007 (de maldekstre) Vida, Salo, Jogailė, Maro

Sonja: *Kiel edziniĝi? Mi ne havis fianĉon. Kie en la socialisma, sed katolika lando, trovi kandidaton por edziĝo kun azia paganino? Mia situacio fariĝis senespera. Ĉiukaze mi devis finfine trafi la ambasadejon. Tio egalas*

memmortigon. Sed en tiu ĉi laŭvica danĝero denove etendiĝis al mi la helpema mano. Mia intima amikino Jadwiga vizitis min kun sia fianĉo kaj diris: „Kristoforo estas preta je fikcia geedziĝo kun vi”. Mi ekploregis kaj ankaŭ ili. Por edziniĝi, Sonia devis prezenti atestilon pri sia civila stato. Tiu ĉi postulo celas ekskluzivigi bigamion kaj koncernas ĉiujn eksterlandanojn. Sufiĉas akiri respektivan dokumenton en sia konsulejo. Se tien irus Sonja, ŝi tutcerte estus sendita al sia lando „por ripozo”. La ĉivilstata oficisto sugestis solvi la problemon per juĝa proceso: „kaŭze de alta neceso”, ekzemple pro gravedeco. Tiel agis la mistifika gefianĉa paro, kaj la juĝa verdikto montriĝis pozitiva. En la intima, amika rondo estis aranĝita la „blanka nupto”, sen ajna pompo.

Sonja: *Kiel edzino de pola civitano, kvankam fikcia, mi regajnis la vivon realan. Tiom da homoj helpis min efike! Mi renaskiĝis kiel studentino, reakiris stipendion kaj mian liton en la studenta domo. La neimagebla, sed fakta feliĉo, spronis mian studpasion. Nur de tempo al tempo mi „rendevuis” kun mia „blanka edzo” en la ĉeesto de lia vera fianĉino. Tri monatojn post la nupto, Jadwiga vizitis min kaj konfidence petis „redoni” la edzon, ĉar ŝi gravediĝis. Necesis komenci proceduron de divorco. En la juĝejo ni prezentiĝis triope. Hazarde, la divorcan proceson kondukis la sama juĝistino, kiu validigis al mi la rajton edziniĝi al Kristoforo pro la „alta neceso”. Ŝi treege nervoziĝis, kiam vidis la saman paron, volantan divorci, kaj imputis al ni la ofendon de la juĝeja digno. Tiam intervenis Jadwiga kaj per tremvoĉo sincere prezentis la veron. Ŝi konfesis, ke estis ŝia ideo la edziĝo de ŝia fianĉo kun mi, ĉar nur tiamaniere eblis savi mian vivon. „Ni ne kapablis forlasi nian amikinson en la ekstrema malfeliĉo” – finis sian parolon Jadwiga. La juĝistino ekstaris kaj senvorte eliris. Ni restis senmovaj, plenaj de emocio, kaj ne sciis, kion fari. Post mallonga tempo la juĝistino revenis kaj per trankvila voĉo legis jesan verdikton pri divorco. Sekve, ŝi alproksimiĝis al nia triopo kaj ĉiun aparte kisis. Al mi la juĝistino, krome, donacis ĉokoladon kaj foriris. El niaj okuloj elfluis larmoj.*

Sunay Kim ricevis la diplomon de magistro pri kemio kaj komencis serĉi laboron. Ŝi eksciis, ke apud Varsovio estis malfermita nova kemia fabriko. Ŝi alvenis tien, montris sian diplomon, ricevis personan formularon, skribe respondis demandojn kaj subskribis. La oficisto pri personaj aferoj tralegis la formularon kaj petis kompletigi ĝin koncerne la loĝadreso. Sed Sonia ne havis ĝin, nur provizore loĝis plu en la studenta domo. La proceduro de ŝia laborigo fiaskis, ĉar oficiala registriĝo en konstanta loĝloko estis kondiĉo, por ricevi laboron. Kiam Sonja estis eliranta eksteren, salutis ŝin viro kiel sian novan laborkoleginon. Ŝi respondis malĝoje, ke oni ne dungis ŝin pro la manko de konstanta loĝadreso. Li, kvazaŭ Anĝelo Gardanto, gaje diris, ke li konas maljunulinon, kiu bezonas prizorgantinon kaj rekompence povas ŝin registri

en sia hejmo. Sonia volonte profitis la ŝancon, ekloĝis proksime al la fabriko kaj estis dungita. Ŝi laboris tie ĝis sia emeritiĝo. Intertempe ŝi edziniĝis al la geologo Wiesław Jędrzejczak, naskis filon kaj vivis longe en feliĉo. Ŝi forpasis en la jaro 2014.

Pri kio ni aŭdas

La organiza teamo de la 32-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo

Fotokonkurso pri naturo

Okaze de la 32-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo, oni organizis la fotoekspozicion „Naturo per okuloj de esperantistoj”. Siajn verkojn sendis 10 samideanoj el Pollando kaj Slovakio. Sume, ni ricevis ĉirkaŭ 100 fotografaĵojn pri faŭno kaj floro. Pro la limigita spaco, la organizantoj elektis, por prezenti en ekspozicio, organizata en la kulturcentro de la kvartalo Podgórze, pli-malpli duonon de la plej bonaj verkoj.

Ĉiuj samideanoj (35 personoj), ricevis broŝurojn kun priskriboj (en 3 lingvoj: Esperanta, pola kaj slovaka) de la verkoj, prezentitaj en

la fotoekspozicio. La partoprenantoj de la aranĝo elektis 3 la plej interesajn verkojn. La unuan premion ricevis Vlado Ŝkuta el Slovakio, la duan - Andrzej Sochacki, la trian - Adam Wilkus el Pollando.

Krom esperantistoj-partoprenantoj, multaj aliaj personoj, vizitantaj la kulturcentron dum la tuta semajno- (la 11-a -18-a de septembro 2020), povis rigardi la ekspozicion. La fotografaĵoj aĉetebblas. En la menciitaj broŝuroj oni publikis ankaŭ kontaktinformojn pri la fotantoj.

Gratulon al ĉiuj samideanoj, kiuj kontribuis al la fotoekspozicio!

Teresa Pomorska - prezidantino de Silezia Esperanto-Asocio

Du konkursoj en Wrocław

Karaj gesamideanoj, ĉi-jare nia Esperanta movado en Malsupra Silezio festas sian 115-an jubileon. Pro la pandemia tempo, ni - simile kiel

multaj aliaj asocioj - agas iom alie ol kutime. Tamen, tiu situacio havas siajn avantaĝojn, ĉar pli multe oni devas kaj scipovas fari virtuale.

Nun ni volas inviti vin al 2 movadanaj konkursoj.

Vroclavaj esperantistoj decidis festi 115-an jariĝon de Esperanto en Vroclavo per organizado de jenaj E-konkursoj:

- Internacia E-konkurso por poema miniaturo "Espero estas verdkolora" Wrocław 2020.

- Intergeneracia konkurso de interpretado (la 3-a eldono) „Ni iru kune plu!” Wrocław 2020.

Celo de la konkursoj estas promocio de humanismaj Esperantaj valoroj, instigo por pripenso, instigo por montro de la propra kreemo ankaŭ serĉado de lingvaj kaj artistaj talentoj.

Precipe tiu unua estas destinita al esperantistoj de la tuta mondo. Helpu al ni, sendante viajn kreaĵojn.

Ni volus montri al lokaj instancoj, kiel vastan atingeblecon havas la esperantista movado. Jen ligilo al la paĝo kun konkursaj regularoj (en pola lingvo kaj en Esperanto) <https://sites.google.com/view/avanaforumo/>

Mi petas, transsendu tiun ĉi mesaĝon al viaj geamikoj, pri kiuj vi scias, ke ili ŝatas krei mallongajn versaĵojn. Mi supozas, ke tiaj kreaĵoj multas en la esperantista medio.

UEA Komunikoj

Roman Dobrzyński premiita dum la “MondaFest”

Dimanĉe, la 6-an de julio, kadre de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest’ 2020), en bunta kaj elstare kunmetita virtuala festo-ceremonio, la Komisiono pri Belartaj Konkursoj de UEA diskonigis la ĉijarajn rezultojn. Miguel Gutiérrez Adúriz, Sekretario de la Belartaj Konkursoj, bonvenigis la spektantojn kaj anoncis, ke la konkurson partoprenis 151 verkoj el Afriko, Azio, Eŭropo kaj Ameriko. La prezidanto de la Belartaj Konkursoj, Miguel Fernández, en la malferma parolado anoncis la baldaŭan aperon de *Antologio de Mikronoveloj*, partoprenintaj en la Belartaj Konkursoj, kiuj fariĝas 70-jaraj en 2020. Omaĝe al la ĵus forpasinta poetino Júlia Sigmund, li deklamis ŝian poemon “Doloro”. La tutan ceremonion eblas re-spekti en la kanalo de UEA en Jutubo, UEA viva: <https://youtu.be/t8l1nRyo6a8>

La diversajn disdonitajn premiojn anoncis, laŭvice, membroj de la diversaj juĝantaj triopoj. Jen la fragmento el la juĝverdikto:

BRANĈO ESEO: Partoprenis 10 verkoj de 10 aŭtoroj el 9 landoj [6 el Eŭropo, 2 el Azio, 1 el Afriko].

Juĝkomisiono: Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao.

La unua premio – Premio Luigi Minnaja: ne aljuĝita.

Dua premio: “Komparo inter Esperanto kaj Okcidentalo” de Emanuele Bovio-Regano el Italio.

Tria premio: ne aljuĝita.

La honoran mencion gajnis la verkoj:

“**Halka kantas Esperante**” de **Roman Dobrzyński** el Pollando.

“De hilelismo al Homaranismo: Ĉu nova hipotezo?” de Roberto Lloancy el Francio.

Robert Kamiński

Fariĝu Esperanto-komercisto

Ĉe <https://eksiaskiyezykowe.pl> vi povas trovi oferton de kelkaj programoj por lerni Esperanton. Por tiuj, kiuj ne konas la lingvon, estas proponata telefona aplikaĵo titolita “Moderna aplikaĵo por lerni Esperanton” kaj “Esperanto-lingva kurso por komencantoj sur kompaktdisko”. La tria, plej kurioza propono estas “Komerca Esperanto-lingva kurso en la pola sur KD Talk Komerca Esperanto!” Reklamante siajn programojn, la vendisto prezentas, interalie, la jenajn avantaĝojn de la kurso: „• *Parolas gepatralingvaj homoj* • *Vi praktikas paroli kaj kompari vian prononcon kun denaskaj parolantoj.*” Ĉu vere?

Laŭ mi, ĝi estas pli ĝuste kopio de reklamo, preparita por aliaj lingvokursoj. La priskribo de la instrumentado ankaŭ estas interesa. “*La lernometodoj ellaboritaj kaj patentitaj de la kreintoj de uTalk atingas tiel grandajn rezultojn danke al stimulado de ambaŭ flankoj de la cerbo samtempe: vida memoro (dekstra flanko de la cerbo) kaj vorta memoro (maldekstra flanko de la cerbo).* Ĉi tiu duobla kodigo plibonigas memoron kaj lernokapablon. Lernado strukturita kiel ludo havas mirindajn rezultojn facile klarigeblajn science. Dum libera kaj



senpaga, ludema lernado, liberiĝas la kemiaj dopaminaj neŭrotransmitoroj, kiuj, plibonigante vian humoron, motivigos vin kaj volas lerni pli longe. Danke al ĉi tio, vi lernos pli kaj memoros pli. Kaj vi amuziĝos samtempe! "

Bedaŭrinde, la prezoj de la programoj ne estas favoraj, eĉ por prove aĉeti ĉi tiujn programojn. Mi esperas, ke tamen estos homoj, kiuj aĉetos la programojn de uTalk kaj lernos Esperanton kaj eble eĉ fariĝos E-komercistoj. 😊

Vizitindaj lokoj

Robert Kamiński

La plej malnova minejo en la mondo nun vizitebla

En la meza Pollando, ĉe la rivero Kamienna, proksime al Ostrowiec Świętokrzyski, troviĝas la mondskala interesaĵo por sciencistoj kaj allogaĵo por turistoj: Krzemionki Opatowskie - prahistoriaj minejoj de siliko (ĉefe la striita).


Tie troviĝas la plej grandaj en Eŭropo minindustriaj kampoj de ĉi tiu krudaĵo kaj la sola en la mondo minejo de striita siliko, malfermita por turistoj!

La unuaj minejoj ekaperis en tiu loko ĉirkaŭ 3900 jaroj a.K. kaj ili funkciis ĝis ĉirkaŭ 1600 j. a.K. Tiutempe tie estis konstruitaj 4000 ŝaktoj.

Oni povas imagi, kian ŝanĝon en la vivo de la ĉirkaŭa loĝantaro kaŭzis la striita siliko, kiun oni komencis elfosadi sur tiu tereno. El la siliko oni faris batalhakilojn, hakilojn, falĉtranĉilojn kaj aliajn ilojn, ofte malgrandaj. Siliko havas la bonan econ: kiam ĝi estas ĝuste rompita, ĝi havas tre akrajn randojn. Tiel, la prilaboro de ŝtono estis tie tre aprezata kapablo. Tie kreiĝis ankaŭ la profesio de ministro.

Ĉiuj tiuj ŝaktoj situas sur la areo de ĉirkaŭ 78,5 ha, en la formo de parabolo. Hodiaŭ, la turisma itinero longas 1,5 km, parte sub tero kaj parte sur la tersurfaco. La vojo komenciĝas ĉe la parkejo kaj ebligas rapide turniĝi al la arkeologia rezervejo. Dumvoje oni transiras arbaron, kiu estas naturrezervejo kaj preterpasas ankaŭ rekonstruitan, malnovtempan setlejon, kiu konsistas el 4 domoj. Ĝi celas prezenti la ĉiutagan vivon de la homoj el la frua ŝtonepoko kaj la frua bronza epoko. Kelkaj elementoj de la setlejo rilatas al la homoj, laborantaj en la minejoj de la striita siliko en Krzemionki. Temas pri simplaj domoj, konstruitaj el ligno kaj parte

"gipsitaj" per argilo - ili ebligas la imagon, kiel loĝis la lokaj homoj. Somere tiu subĉiela minimuzeo aranĝas arkeologiajn laborejojn.



Subtera mineja koridoro (meze profundigita por turistoj)



Fragmento de la subtera koridoro kaj enscenigita mineja ejo en Krzemionki Opatowskie, foto: Paweł Wroński



Simpla mineja ŝakto, foto: Krzysztof Pęczalski

Dum marŝado al la minejo, oni povas rigardi la minejajn ŝutmontojn kaj kavojn. Tio estas nenio alia ol kalkŝtonaj rokoj, kiuj estis elfositaj al la tersurfaco kaj nun, post miloj da jaroj, superkreskita per la ĉirkaŭaĵa vegetaĵaro.

La ekstremaj vizitkondiĉoj komenciĝas subtere. Temas pri minejoj, kies koridoroj ŝajnas daŭri sen fino. Homoj, per simplaj iloj (aŭ tute sen ili), scipovis fosadi kelkfoje ĝis 11 metrojn suben, nur por akiri la aviditan stritan silikon. Tiu siliko estis la plej valora, kion ili povis trovi ĉi tie. Danke al la elfosado, disvolviĝis la setlejo, kreskis, komerco kaj spirita vivo de la loĝantoj.

La tuneloj estas de 50 ĝis 120 cm altaj, kio signifis, ke la tuta laboro devis esti farita surgenuje aŭ kuŝante. Temperaturo en la tuneloj estas sufiĉe konstanta - inter 5 kaj 9 gradoj. Krome, tie estas granda aera humido. Tio kaŭzis oftajn malsanojn de ministoj. La meza aĝo, en tiu tempo, estis mallonga - preskaŭ neniu vivis tridek jarojn.

La homoj, laborantaj ĉi tie, havis tre malgrandan scion, sed malgraŭ tio ili konstruis setlejojn, fosis minejojn, kiujn karakterizas altkvalita “inĝeniera laboro”. Kaj ĉio ĉi farita helpe de lignaj aŭ ŝtonaj iloj. Rigardante ilian laboron, la ŝaktojn, fositaj antaŭ multaj miljaroj, oni povas vere senti sin surprizita pro la inventemo, obstino kaj forto de la tiamaj homoj.

La striita siliko havas tre interesan formon kaj estas ege bela. Iam ĝi estis ĉefe uzata por produkti ilojn kaj ĉi tie ĝi estis ekspluatata je industria skalo kaj eĉ eksportata eĉ 660 km for! Hodiaŭ ni povas aĉeti juvelaĵojn el la siliko, kiu konkurencas kun sukcesaj produktaĵoj.

Tre interesa estas ankaŭ, trovita sur unu el la lokaj rokoj, desegno, kiun sciencistoj rigardas kiel simbolo de Diino de la Tero, protektanta ministrojn. Tiu ĉi objekto aĝas pli ol 2000 jarojn! Nun ĝi videblas, ankaŭ, interalie, sur la emblemo de Krzemionki Opatowskie.

Vizitado de la minejo ĉiam okazas kun partopreno de gvidanto. Krom la minejo, turistoj povas viziti malgrandan muzeon, kie oni povas rigardi eltrovaĵojn el la regiono: - ekzemplojn de simplaj iloj, rokojn, argilajn ujojn, ktp. La muzeo estas bona aldonajo al tio, pri kio rakontas gvidanto. Por viziti Krzemionki Opatowskie, oni devas rezervi minimume 2 horojn.

Krzemionki Opatowskie troviĝas sur la Listo de la Monda Heredaĵo de Unesko. Tio estas, iusence, la kulmina atingo de la multnombraj esploroj kaj agoj, entreprenitaj ĝis nun, iniciatitaj de du polaj sciencistoj - la geologo Jan Samsonowicz kaj la arkeologo Stefan Krukowski.

Krzemionki Opatowskie estas mondscale unika loko kaj por turistoj ĝi estas vere vizitinda.

Linguosciencia angulo

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

De rilate al partícipo

Aktiva partícipo

Ĉe aktiva partícipo kun A-finaĵo aŭ E-finaĵo, *de-esprimo* havas la samajn signifojn kiel ĉe verbo:

- *Ni estis **vojaĝantaj de lando** al lando.* = ...vojaĝis de lando al lando.
- ***Ruĝiginte de honto** ŝi forkuris.* = Post kiam ŝi ruĝiĝis de honto...
- *Ne parolu al li antaŭ ol li estos **trankviliĝinta de la ŝoko**.* = ...antaŭ ol li trankviliĝos de la ŝoko.

Aktivaj participoj kun O-finaĵo montras personon (iafoje aĵon), kiu faras, faris aŭ faros agon. Ĉe tiaj vortoj *de*-esprimo ĉiam montras la sencan objekton de la ago:

- *Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo.* La savanto savos la mondon. *De* montras objekton.

- *La konfesantoj de unu religio estas samreligianoj.* Ili konfesas unu (saman) religion.

- *Ĉiuj loĝantoj de regno estas regnantoj.* Ili loĝas la regnon.

Pasiva participo

Rilate al pasiva participo, *de* plej ofte montras sencan subjekton, aganton:

- *Ŝi estas amata de ĉiuj.* Ĉiuj amas ŝin.

- *Tiu ĉi komerĉaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi.* Mi aĉetas la komerĉaĵon.

- *La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi.* Mi aĉetis la surtuton.

- *La ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi.* Mi ne pagos la ŝuldojn.

- *Li staras kvazaŭ frapita de fulmo.* Ŝajnis, kvazaŭ fulmo frapis lin.

- *La montoj estis kovritaj de neĝo.* Neĝo kovris la montojn.

- *La tempo fluis ne rimarkate de ili.* Ili ne rimarkis la fluon de la tempo.

- *Ili estas konatoj de mi.* Ili estas personoj, kiujn mi konas.

Oni ankaŭ povas uzi *fare de*, se oni volas tre klare montri, ke temas pri aganto: *La infano estis forprenita fare de la patrino.* Sed tio malofte estas necesa ĉe pasivaj participoj.

Se oni volas uzi alisignifan *de*-esprimon ĉe pasiva participo, oni ordinare devas tion montri klare per *disde, for de, el de, ekde* aŭ simile:

- *La infano estis forprenita disde la patrino.* Oni forprenis ĝin de la patrino.

- *Tiuj riĉaĵoj estas hereditaj el de ŝia avo.* Se oni uzus simplan *de*, la senco estus, ke ŝia avo heredis la riĉaĵojn, sed la intencita senco estas, ke iu heredis ilin de li.

- *La oficejo estas malfermita ekde la naŭa horo.* Ĉi tie ankaŭ simpla *de* bone funkcias, ĉar apenaŭ estus eble miskompreni.

Kiam la aganto estas spertanto (sentanto), oni ofte uzas *al* anstataŭ *de*, precipe ĉe la participo *konata*.

Sed se la kunteksto malebligas miskomprenon, simpla *de* povas esti uzata ĉe pasiva participo ankaŭ por alia signifo ol senca subjekto:

- *Tiam alvenis birdoj nesciate de kie.* *De* montras originon.

- *Naŭ deprenite de dudek estas dek-unu. De montras formovon.*
- *La hospitalo estas apartigita de la strato per sufiĉe alta krado. De montras apartigon. Disde la strato estus pli klara ĉi tie.*

Literaturaĵoj

Teresa Nemere

„Ne malkuraĝu,”

La japana samideano Yamato Shinjiro, loĝanta ekde la jaro 2013 en Pollando, sendis al mi esperantigitaj de li 42 versaĵojn de la japana poetino Ŝibata Tojo. La versaĵoj kaj ankaŭ informoj pri la aŭtorino estas tre interesaj. Mi tuj proponis interesigi pri tio legantojn de “Pola Esperantisto”. La ĉefa redaktoro akceptis la proponon kaj ni decidis aperigi jam en la sekva numero elektitajn versaĵojn kaj ankaŭ informojn pri la vivo de la poetino.

Ŝibata Tojo komencis verki estinte pli ol 90-jara. Ŝia unua poemaro, titolita „Kujikenaide” (Ne malkuraĝu), estis eldonita en la jaro 2010, kiam la aŭtorino estis 99-jara. La libro vendiĝis en pli ol 1,6 miliono da ekzempleroj kaj tradukita ekaperis ankaŭ en Koreio, Tajvano, Nederlando kaj Germanio. En la jaro 2011, oni eldonis la duan poemaron de Ŝibata Tojo titolita “100-jaraĝa”.

Ĉu nun ne estas tempo por popularigi tiun ĉi poezian trezoron en Esperanto? Sinjoro Yamato, tradukante la versaĵojn, jam faris gravan paŝon al tiu direkto. La aperigo de kelkaj esperantigitaj versaĵoj de tiu verkistino sur paĝoj de “Pola Esperantisto” estas la unua popularigo de la fenomenaj eventoj pere de la internacia lingvo.

Ŝibata Tojo



Ŝibata Tojo naskiĝis en 1911, kiel filino de riĉa rizovendisto en la urbo Toĉigi (100 km norde de Tokio). Estante nur 10 jara, pro malboniĝo de la patra bonstato, ŝi devis eklabori kiel servistino. Edziniĝinta dufoje, la tutan vivon laboris en gastejoj aŭ restoracioj. Ŝi laboris ankaŭ hejme, kreante tradiciajn japanajn vestojn. Nur ŝia dua edziniĝo estis feliĉa kaj fruktis per la filo Keniĉi. Ekde la jaro 1992, post morto de la edzo Eikiĉi, ŝi sole vivis en la urbo Ucnomija (120 km norde de Tokio) kaj, estante jam pli ol 90-jara, komencis verki poeziaĵojn kaj sukcesis ĝisvivi preseldonon de siaj poemaroj en Japanio kaj ankaŭ eksterlande. La poetino forpasis en la jaro 2013.

Patrino

Same, kiel mia forpasinta patrino,
mi estas nun 92-jara.
Ofte mi pensas pri ŝi.

En flegejo por maljunuloj,
ĉiufoje, kiam mi vizitis mian
patrinon,
mi sentis kordoloron.

Dum adiaŭo longe rigardis min
la patrino.
Nuba ĉielo,
kosmoso svingiĝis en la vento.

Mi ankoraŭ klare
memoras.

Forto por vivi

Pasis 90 jaroj, nun
unu tago, ĉiuj tagoj
estas tre valoraj.

Vangon tuŝas vento,
telefonvokas amiko,
vizitas min homoj.

Ĉiuj

↗

al mi
energion por vivi
donas.

Mi

Jam pli ol 90-jara,
mi verkas poemojn.
Ĉiutage la vivo estas valora.

Mia korpo estas maldika, sed
miaj okuloj povas enrigardi
korojn de homoj,
miaj oreloj povas aŭskulti
flustron de venteto,
mia buŝo estas
tre vigla.

Oni admiras min:
" Vi estas perfekta"
Tion mi ĝojas
kaj mi povas klopodi plie.

Al filo

Kiam vi havas ĉagrenan aferon,
rememoru panjon.

Al iu ajn
ne eksplodu kolere,
poste vi mem

malŝatos vin...

Jen rigardu!
Al la rando de fenestro
venis sunlumo,
birdoj ĉirpas.

Trankviliĝu, estu kuraĝa,
birdoj ĉirpas.
Ĉu vi aŭdas, Keniĉi?

Respondo

La vento ĉe mia orelo:
"ĵam baldaŭ
al alia mondo
ni iru"
logis min
per katdolĉa voĉo.

Mi tuj respondis:
"ankoraŭ iom
mi restos ĉi tie,
ĉar estas
multaj farendaĵoj"
La vento,
kun embarasita vizaĝo,
returnis sin silente.

Rememoro 1

Ni havos bebon
mi diris,
tiam vi:

↗

"Ĉu vere, mi ĝojas,
de nun mi
pli serioze
laboros."

Ni ŝultr' ĉe ŝuldro,
sur aleo de sakurajboj,
promenis hejmen.

Tiu tago estis mia la plej feliĉa.

Dio

En pasintaj jaroj
estis junuloj, kiuj kredante, ke ili
savas sian landon,
rapidis al morto.

Nun
estas tiaj geknaboj, kiuj
ĉagrenitaj, turmentitaj de aliaj,
mem mortigas sin.

Ho, Dio!
Kial vi ne donis
al ili
kuraĝon por vivi?

Militoplanistojn,
homojn, kiuj turmentas aliajn,
per via forto
surgenuigu.

La ĉielo

Kiam mi sentas solecon,
mi rigardas la ĉielon:
nuboj kvazaŭ familio,

nuboj kvazaŭ japana mapo,
estas ankaŭ nuboj, kiuj kuras kaj persekutas.
Kien ili ĉiuj fluas?

Vespere rubikolora nuboj,
nokte steloj, disŝutitaj sur la tuta ĉielo.

Ankaŭ por vi
necesas libera tempo
rigardi ĉielon.

Saĝulaj pensoj

Anton Oberndorfer

Okulvitroj povus malaltigi infektan riskon

Kuracistoj en Ĉinio observis, ke relative malmultaj Kovim-19 (COVID-19)-pacientoj estis portantoj de okulvitroj. Ili tial supozas, ke okulvitroj povus esti ŝirmiloj kontraŭ infektoj.



Kiu portas okulvitrojn kaj surmetas protektan maskon sur buŝon kaj nazon, por protekti sin kontraŭ infektiĝo per kronviruso, tiu ofte ĉagreniĝas, ĉar la vitroj ofte malklariĝas. Okulvitroj kaj masko: Ĉu tio estas malbona kombino? Eble la malo estas ĝusta: La okulvitroj estas eble

optimuma kompletigo al la protekto de buŝo kaj nazo, ĉar okulvitroj povus kontribui por malaltigi la infektan riskon.

Indikon pri tio donas studaĵo, kiu aperis en la ĉina faka ĵurnalo. Teamo de ĉinaj kuracistoj raportas pri 276 Kovim-19-malsanuloj, kiuj estis kuracataj en la hospitalo de Suizhou Zengdu. La trafitoj estis averaĝe en la aĝo de 51 jaroj. Nur 16 el ili, do apenaŭ 6 procentoj, portis ĉiutage almenaŭ dum ok horoj okulvitrojn. Neniu portis kontaktolenojn.

La medicinistoj komparis tiun mezurvaloron kun nombroj de pli frua studaĵo el la jaro 1987 en la Hubej-provinco - en kiu la urbo Suizhou situas.

Laŭ tio, iom pli ol 31 procentoj de la studentoj tie estis miopaj. La tiam enketitaj studentoj estas nun proksimume en tiu aĝo kiu korespondas al la averaĝa aĝo de la Kovim-19-malsanuloj.

Se oni komparas ambaŭ nombrojn, videblas, ke estas mirinde malmultaj portantoj de okulvitroj inter la Kovim-19-malsanuloj, eĉ se oni konsideras, ke ne ĉiu miopulo daŭre portas okulvitrojn. El tio ja ne eblas senambigue dedukti, ke okulvitroj protektas kontraŭ infektoj. Povas ankaŭ esti, ke aliaj faktoroj eksplikas la kunrilaton, aŭ, ke temas ĉe tiu malgranda nombro de pacientoj simple pri hazardo.

Tamen eblas supozi, ke okulvitroj helpas eviti la infekton. Kiel la teamo skribas, homoj, laŭ alia studaĵo, tuŝas la okulojn ĉirkaŭ dek fojojn dum horo. Se iu havus virusojn sur la fingroj, tiam tiuj virusoj povus atingi la okulojn kaj tiam ili sufiĉe simple povus enpenetri en la korpon. La okulvitroj do evitas la ofte hazardajn tuŝojn per manoj, per kiuj tiaj infektoj povus okazi.

Ke la okuloj povus esti enirpordo por la kronviruso, tion skribas ankaŭ la ŝtata germana san-informa centro: "Infektiĝo povas okazi, se tiaj virusenhavaj aerosoloj atingas la mukajn haŭtojn de nazo, buŝo kaj laŭokaze ankaŭ okulojn de alia persono."

Tiu eta studaĵo provas ke kvankam okulvitroj ofte nebuliĝas kiam oni portas maskojn, uzi ilin kun la masko povas doni plian protekton kontraŭ la viruso. Okulvitroj povas redukti la riskon de infekto.

Leterkesto



Irina Mirina Goncharova, EoPK ankaŭ por vi

Kio estas EoPK kaj kiel al ĝi aliĝi? **Esperanta Poŝtkrucigo** estas interŝanĝo de poŝtkartoj kun esperantistoj el diversaj landoj, regionoj, urboj kaj vilaĝoj. Ĉu ne estas bona ideo sendadi belajn bildkartojn al la esperantistoj, hazarde elektitaj de la aŭtomata sistemo? Ĉu ne estas agrable trovi en sia enireja poŝtkesto surkartajn salutojn en Esperanto de nekonataj (aŭ konataj!) samlingvanoj? Ĉu ne vi, aŭ viaj E-gelernantoj, aŭ viaj E-gekonatoj estas tia homoj? Do, ne prokrastu - aliĝu tuj!

Venu al la paĝaro <https://bildkarto.wixsite.com/bildkarto> kaj plenu tre simplan aliĝilon. Vi tuj ricevos per elektronika poŝto ies adreson! Elektu en papervendejo bildkarton, surskribu ĝin kaj sendu el la poŝtejo. Kaj atendu surprizojn en via poŝtkesto! Ĝuu belecon de la bildkartoj kaj

amikemon de esperantistoj el la tuta mondo! Invitu aliajn esperantistojn al la bildkartinterŝanĝo! Al ĉiuj viaj demandoj vi trovos respondon en la paĝaro en la parto "Oftaj demandoj" aŭ skribinte al la organizantoj: bildkarto@gmail.com Dankon! Ĝis la bildkarto!



Magdalena Tatara „Kalkulado” en Wieliczka

Promenante laŭ la malgranda strato en Wieliczka, hazarde mi trovis reklaman tabulon pri la kontada oficejo “Kalkulado”. La nomo de la oficejo estas sendube prenita el Esperanto. Vi povas retroŝte demandi la oficejposedantojn, ĉu ili konscie uzis Esperantan vorton, kiu precize reprezentas la profesion, pri kio okupiĝas la oficejo.



Magdalena Tatara, ILEI alvokas

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - POLA SEKCIO invitas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri instruado de Esperanto kaj pri progresado en la lingvo, membriĝi al ILEI.

Membrokotizoj kaj abonoj 2021:

60 zł - membrokotizo de ILEI kun papera *Internacia Pedagogia Revuo*

30 zł - membrokotizo de ILEI kun reta aliro al IPR, IPR estas inkluzivita en la membreco.

65 zł - abono de *Juna Amiko* (papera)

35 zł - abono de *Juna Amiko* (reta)

105 zł (anstataŭ 125 zł) = **SUPERA MEMBRO** de ILEI kun plena aliro al www.edukado.net (demandu pri tio sekciestron, papera IPR kaj papera JA ricevos en la sama koverto)

LIMDATO PO MEMBRIĜI: LA 31-a DE DECEMBRO 2020

Eblas pagi la membrokotizojn kaj abonojn al la konto de Pola Sekcio de ILEI n-o 42 2130 0004 2001 0558 6110 0009 – VolkswagenBank. Posedando de la konto estas Pola Esperanto-Asocio.

Korespondadreso de ILEI-PL: ul. Grzegórzecka 74/4, 31-559 Kraków, Retadreso: mtatara@gmail.com, Plie pri ILEI legu ĉi tie: <https://www.ilei.info/>

Esperanto-aranĝoj en Pollando en 2020

Forstrekitaj aranĝoj estis planataj, sed pro la pandemio ne povis okazi aŭ okazos alitempe

2-10. 09.2020	53-a Internacia Esperantista-Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto-Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl
5.09.2020 15:00	Nacia legado en Esperanto „Balladyna” de Juliusz Słowacki	Esperanto-libraro, Podlaha Libraro, Ludoviko Zamenhof Centro, Bjalistoka Esperanta Societo, kontakt@espero.bialystok.pl
11-13 09.2020	Esperantaj Tagoj de Krakovo	Krakova Societo Esperanto kse.krakovo@gmail.com
11-13. 09.2020	“Esperanto sur Strando” en Sopot	Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/ FB – Esperanto Sopot.pl
18-20. 09. 2020	36-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto- „Arkones 2020” en Poznań	E-SENCO Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. http://www.arkones.org/eo/
25.10. 2020	Johano Paulo la 2-a – Esperantisto	Bjalistoka Esperanta Societo kontakt@espero.bialystok.pl
9-11. 10.2020	44-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl
11.2020	Esperantista renkontiĝo- GRUPE – 24 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl
5-6. 12.2020	5-a Esperanta konkurso “Vortbelego en Esperanto” en Wrocław	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka

11-13. 12. 2020	21-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanta Societo kontakt@espero.bialystok.pl
1-3.1. 2021	12-a JES Junulara Esperanta Semajno okazos virtuale kaj samtempe en multaj lokoj.	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl

Universalaj Kongresoj de UEA

1-8.08. 2020.	La 105-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado). <u>En 2020 nur okzis virtuala kongreso UK en tradicia formo okazos en 2022</u>	Universala Esperanto-Asocio uea.org
17-24.07. 2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Belfasto (Nord-Irlando) Okazos en 2021	Universala Esperanto-Asocio uea.org

Diverse, facile, bonguste

Teresa Nemere

Respondante al la alvoko de la ĉefa redaktoro en la lasta numero de "Pola Esperantisto" mi sendas manĝoreceptojn akiritaj de Augusto Casquero de la Cruz, esperantisto el Hispanio, kiu kelkfoje ne nur prelegis en nia urbo (Toruń), sed eĉ regalis nin per preparita dum la renkontiĝo la fama, hispana sangria. Mi notis kaj provis kelkajn el liaj proponoj.


Du hispanaj receptoj

Jen la recepto por **hispana omleto**: 60 dg da terpomoj, 30 dg da cepo, 4 ovo, oleo, salo. Pecigi terpomojn kaj cepon, saligi kaj rosti ĉion en la profunda oleo, sur la malgranda fajro. En aparta poto kirli ovojn. Rostitajn terpomojn kaj cepon filtrsekigi kaj aldoni al la miksitaj ovo. Ĉion verŝi sur rostilon kun iom da oleo, post momento renversi por rosti la alian flankon. Manĝi kun iu legomsalato.

Facile eblas prepari ankaŭ la faman hispanan trinkaĵon **sangria**: necesas por ĝi mezgrandaj: pomo, persiko, piro, iom da konjako, botelo da ruĝa, dolĉa aŭ duondolĉa vino, ½ l da oranĝosuko, iom da cinamo kaj 2-3 kuleretoj da sukero. La fruktoj oni devas tranĉi je kubetoj, aldoni pinĉprenon da cinamo kaj sukero, surverŝi per iom da konjako kaj lasi por 1/2-1 horo, aldoni vinon kaj oranĝotrinkaĵon, poste ĉion miksi.

Eblas aldoni kubetojn de glacio.

Oni eldonis



PEJ ĉe Fejsbuko

Nova libro en Bjalistoko

De la 6-a de novembro 2020 oni povas aĉeti la infanlibron pri Zamenhof en la pola lingvo “Doktor Esperanto i język nadziei” eldonita de la eldonejo *Mamania*. La publikigo de la libro estas patronata inter alie de Bjalistoka Esperanto-Societo kaj Pola Esperanto-Junularo.



Kune kun la antaŭe menciita eldono de “Baladina” en Bjalistoko estas aĉetebla dua esperanta eldono de la fama verko de Juliusz Słowacki”.

“**Mazepa**” – tragedio en kvin aktoj.

Tradukis: Antoni Grabowski

ISBN 978-83-63698-58-4, Dua eldono

Eldonis: Bjalistoka Esperanto-Societo, *Libromondo* Świdnik, *Arslibri* Lublin – 2020



Oni reeldonis lernolibron por Esperanto (por klasoj II kaj III de bazlernejoj) “Nova aventuro = Nowa Przygoda”, de Halina Kuropatnicka-Salomon.

Kun bedaŭro mi transdonas informon, ke sabate la 17.10.2020 mortis esperantisto el Wrocław, **Andrzej Kosiński**. Adiaŭa ceremonio kaj entombigo okazis vendrede la 23.10.2020 en Bolesławiec.
Bogdan Dembiec

El fotogalerio de Andrzej Sochacki

Andrzej Sochacki

La 9-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo 7-9.12.1990.

Fine de la jaro 1990 jam tradicie en Krakova Kulturdomo troviĝanta en la kelo de la Palaco "Pod Baranami" (Sub la Virŝafoj) okazis la 9-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo. Oni povas aldoni ke la Palaco "Sub la Virŝafoj", la tiama kulturdomo, estis palaco de la familio Potocki el 16-a jarcento. La aranĝon organizis Pola Esperanto-Asocio, filio en Krakovo.

Partoprenantoj en la programo povis aŭskulti jenajn prelegantojn: Jadwiga Gibczynska "- Sinjoro Tadeo", "Maria Curie" kaj „La Febla sekso", Antoni Golonka - "Kiel kontraŭbatali Esperanton", Andrzej Pettyn - „Aktuala stato de E-movado", Lidia Ligęza - „Eroj el la aŭtora teko", Adam Sudoł - renkontiĝo kun prezidanto de la Pedagogia Komisiono de PEA, Ryszard Rokicki - "Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia", Marian Kostecki - „Veterana sekcio de PEA", Wojciech Usakiewicz - „E-problemaro en lernolibroj de la internacia lingvo". Maria Majerczak - diskutrondo.

Dum la kunveno estis celebrita sankta meso en Esperanto kaj vespere ĉiujn amuzigis Georgo Handzlik per vort-muzika recitalo.

Okazis ankaŭ kutima perpieda ekskurso tra Krakovo.



E-Tagoj de Krakovo 1990. Foto: A. Sochacki



E-Tagoj de Krakovo 1990, Foto: A. Sochacki



E-Tagoj de Krakovo 1990, Foto: A. Sochacki

La partoprenantoj en salono



E-Tagoj de Krakovo 1990, Foto: A. Sochacki

Wojciech Usakiewicz prelegas pri E-problemaro en lernolibroj de la Internacia lingvo



E-Tagoj de Krakovo 1990, Foto: A. Sochacki

Prelegas Esperantina Mirska



Esperantistoj el Staszów sur la krakova
ĉefplaco


Georgo Handzlik kun sia filino kaj
Jarosław Parzyszek

Amuze

Adam Wilkus

La krucenigmo pri arboj

1. La falfolia arbo el la familio oleacoj, kiu devenas de la suda Eŭropo kaj la duoninsulo Malgranda Azio. Oni ofte ĝin kreskigas en parkoj kaj ĝardenoj kiel la ornama arbo. La folioj kreskas kontraŭ-stare, ili estas kunmetitaj el 9-15 folietoj. La ŝelo estas iomete malebena kaj griza aŭ verdgriza. Ĉi arbo ŝatas malsekajn ĉeriverajn lokojn - marĉojn. Laŭ la skandinava tradicio tiu arbo estas simbolo de la senmorteco kaj de la interrilato inter la tri kosmaj sferoj. En la nord-ĝermana mitologio la arbo de tiu specio, nomata Yggdrasil, estas la arbo de la mondoj. En la antikveco tiu arbo havis grandan magian povon kaj funkciis ankaŭ kiel efika antidoto kontraŭ venenoj (se oni miksu ĝin kun vino).



2. La tipo de pinacoj, kiu perdas siajn pinglojn por la vintro, altas ĝis 40 m kaj havas larĝan kronon el horizontale kre-skantaj branĉoj. Ĝi havas helverdajn, molajn, mallongajn (1-3 cm) pinglojn en konusa formo, kolektitaj en densaj faskoj, metitaj paralele sur mallongaj ŝosoj. Strobilojn ĝi havas sferajn aŭ ovoformajn, brunkolorajn, direktitajn supren. La arbo havas ruĝbrunan lignon valoran kaj longdaŭran. La ligno enhavas multan tanan acidon (taninon) kaj pro tio ĝi estas akvorezista,

uzata en ŝipkonstruado kaj akvaj konstruaĵoj.

3. La falfolia arbo, kiu aŭtune havas buntajn kolorojn, altas ĝis 50 m, kaj havas karakterizajn fruktojn - duflugilajn nuksojn, kiuj defalas kiam ili maturiĝas. Laŭ ilia formo kaj turniĝanta flugmaniero homoj desegnis la flugilon de helikoptero. La blanka aŭ helruĝa ligno estas utiligata precipe por mebloj kaj tornaĵoj. La folio de tiu arbo videblas en la flago de Kanado.

4. La pingloarbo, ĉe kiu la pikantaj, kvareĝaj pingloj staras sur longaj ŝosoj kiel ĉe kombilo, kaj ĉe kiu la strobiloj staras supren, kaj maturiĝante ili disfalas. La arboŝelo estas helgriza kaj glata. Sur la dorsoflanko de la pinglofolioj troviĝas du vaksaj strioj. Iuj specioj de la arbo estas uzataj en pluraj landoj kiel ornamaĵo ĉe kristnaska festo. La arbo ne odoras, kontraŭe al aliaj popularaj koniferoj.

5. La granda falfolia arbo (20–30 m alta) kun korformaj folioj kaj flavecaj floroj, kies pedunklo kunkreskis kun la flaveca braketo, kiu helpas flugporti la semojn. Ĝi havas Eŭropan devenon. Por la praaj slavoj ĝi estis la sankta arbo. Uzata interalie kiel kuracplanto kaj herbo ĉar ĝi helpas kvietigi kaj dormigi.

6. Malofta specio de ĉiamverda konifera arbo. En Henryków Lubański en regiono de Malsupra Silezio kreskas arbo de tiu specio, kiu aĝas 1283 jarojn kaj estas la plej aĝa arbo en Pollando. Ĝi estas ĉirkaŭ 10 m alta kaj ĉirkaŭ 4 m larĝa. Pro la severa klimato en nia lando, la planto ofte havas la formon de arbusto. La ligno de ĉi tiu arbo estis uzata en la produktado de mebloj, arbalestoj kaj pafarkoj. La planto enhavas tre toksan substancon, kiu antaŭe estis uzata por veneni sagojn uzataj de arkistoj.

7. La arbo kreskanta ofte ĉe la rivero, kun krono kovrita de pendantaj, maldikaj branĉetoj kaj longaj lancetformaj folioj, kio donis al la arbo la nomon "ploranta". Ĝiaj floroj estas kolektitaj en t.n. mildaj "katidoj" ĉe la branĉetoj. Homoj ofte uzas ilin kiel ornamaĝo simbolanta novan vivon kaj speciale kristanoj por plekti la Paskan Palmon ĉar la arbo "vekiĝas" plej frue printempe kaj estas simbolo de la reviviĝo kaj senmorteco de la animo.

8. La tipo de pinacoj kiu kreskas super la zono de foliarboj. Ĝi havas kreskantajn spiralforme, ĉiamverdajn kaj rigidajn pinglojn, kiuj estas muntitaj sur lignaj stipoj. Unupingla, la pinglo-sekcia-formo estas lozanĝa, strobiloj pendas suben (tio estas gravaj trajtoj por rekoni la arbon). La arbo estas ofte uzata kiel ornamaĝo por Kristnasko. Ĝi havas intensan rezinan odoron de pingloj, kiuj estas tre akraj. Ĝi estas uzataj akau kiel kuracplanto, en la produktado de alkoholaj trinkaĵoj, kaj ĝiaj radikoj estas uzataj en plektado.

9. La tipo de arboj kun defalemaj, dentaj folioj, kun blankaj floroj en formo de longaj, staraj konusoj, kaj globaj fruktoj kun verda ŝelo, kiuj enhavas brunkolorajn akenojn. Kelkaj specioj de tiu arbo havas la manĝeblajn fruktojn. Laŭ la popola proverbo "Estas tro malfrue por lerni al la jarekzamenoj kiam tiuj arboj ekfloras".

10. La foliarbo kun glata, grizkolora trunkoŝelo. Ĝi devenas de Eŭropo, Azio, kaj Nordameriko, kreskas 30-48 m de alteco. La arbo toleras ombron kaj ĝia krono estas fermita. El semoj de la arbo estas farita oleo. Nuntempe ĝi estas vaste uzata en produktado de mebloj, ĝi estas ankaŭ la baza ero de betula-fago-lamenligno, kiu estas uzata en la aŭtoindustrio (konstruelementoj de busaj sidlokoj, ŝarĝaj skatoloj por liveraj veturiloj) kaj en modelado.

11. Longviva arbospecio, vivanta pli ol 700 jarojn. Ĝi estas granda arbo, ĝis 30 m alta kaj 2-3 metroj larĝa en diametro, kun karakterizaj, averaĝe 10 cm longaj verdaj folioj kun noĉoj kaj ovalformaj fruktoj, pendantaj sur longa pedikulo, konsistantaj el nukso kaj fruktujo, kiuj estas grava nutraĵo por multaj bestoj arbaraj. En Pollando unu el la plej longe vivantaj arboj de tiu specio kreskas en Zagnańsk en la Sanktokruca regiono, aĝas 682 j kaj portas la nomon "Bartek". Laŭ unu el la legendoj, la reĝo Johano la Tria Sobieski kaŝis trezorojn ene de la arbo.

12. La arbo kun blanka trunkoŝelo, t.n. "pionira specio" ofte kreskanta rande de arbaro. Arboj de tiu specio estas la unuaj, kiuj kreskas en malriĉaj, malvarmaj terenoj, kaj post ruinigadoj, kiel fajregoj, ili elportas tre malriĉajn grundojn, malvarmajn klimatojn, sed bezonas multe da lumo, do se poste la arbokomunumo riciĝas kaj pleniĝas, ili malaperas. Laŭ spertuloj pri travivado en malfacilaj kondiĉoj, en la kazo, ke al la vaganto mankas manĝo, oni povas manĝi la trunkoŝelon de la arbo; ĝi estas manĝebla sed ne bongustas. Spertis tion niaj prapatroj.



Ĉijara 53 -a Internacia Esperantista Feriado en Ladek Zdrój



Septembre al Krakovo venis esperantisto el Israelo Hanan Bordin

Ĉu vi aŭskultas Varsovia Vento Elsendoj - www.podkasto.net?

NIA FOTOGALERIO



Salutas vin esperantistoj el PEA-filio en Szczecin



Partoprenantoj de Esperantaj Preĝtagoj 2020 en Częstochowa